

# SOCIA ★ REVUO

693  
1.7.1984



## NIA SITUACIO

La internaciaj rilatoj fariĝante tiel malrapide ni ne povas koni la plenan rezultaton de la apero de nia 1<sup>a</sup> numero, rezultato kiu venos tre malrapide, ĉar ni ne havas la necesajn rimedojn por progresadigi aferon.

Tiuj rimedoj estas multaj: afiŝado, anoncoj en la gazetaro, organizado de la vendo ĉe la librejoj, reklamoj k. t. p. Tiuj rimedoj kostante tre multe, povas esti uzataj nur de la riĉaj entreprenoj; tio ne estas do nia kazo.

Ni havas do nur unu rimedon: fari ni mem tiun ĉi tutan reklamon. Niaj amikoj perdu nenian okazon, ili propagandu en la grupoj, vendu ponumere, k. t. p.

Ni ĵus eldonis cirkuleron, kiun ni sendos al ĉiuj, kiuj bonvolus disdoni ĝin al ĉiuj esperantistoj de sia urbo.

Se ĉiu serioze propagandus kiel ni montris, post kelkaj monatoj oni atingos bonan rezultaton.

Eble ni eldonos kelkajn malgrandajn afiŝojn, kiujn ni devos elmeti en la lokojn la plej videblajn, kie kunvenas la esperantistoj, k. t. p.

La sukceso de nia revuo estos do la rezultato de la energio, kiun ni malŝparos por ĝin konigi.

LA ADMINISTRACIO.

## POR SIMPLEGA LERNMETODO

Ĉe la 1<sup>a</sup> kunveno de la « Ruĝuloj », kiu okazis dum la 2<sup>a</sup> universala Esperanta kongreso en Genevo, niaj amikoj sin priokupis pri simplega metodo por lernado de Esperanto. La ekzistantaj metodoj estis opiniataj tro malfacile akireblaj de la neinstruitoj. Ni ankoraŭ ricevis kelkajn leterojn enhavantajn similajn rimarkojn.

La Asocio *Paco-Libereco* rekoninte la grandan profiton, kiu estos posedante tre simplan kaj agrablan metodon akireblan de la neinstruitoj (la adeptoj fariĝus pli multaj) decidis la eldonon de tiu ĉi metodo.

De nun, konkurso estas malfermita. Ĉiu sendu sian projekton ni konigos ĝin per la I. S. R. Poste oni faros elekton de ĉiuj projektoj per voĉdono. La projekto akceptota estos tuj presita kaj oni faros malmultekostan eldonon. *La konkurso estos malfermita ĝis la 14 de majo 1907<sup>a</sup>.*

Internacia Asocio *Paco-Libereco*.

## Al niaj kunlaborantoj

Ĉiuj manuskriptoj devas esti ricevitaj de la Redakcio antaŭ la 10<sup>a</sup> de ĉiu monato.

Ne estos presataj:

1<sup>o</sup> La manuskriptoj malbone skribitaj;  
2<sup>o</sup> La manuskriptoj, kiuj enhavos tro multajn lingvajn erarojn;

3<sup>o</sup> La manuskriptoj, kiuj estos skribitaj sur ambaŭ flankoj de paperfolio;

4<sup>o</sup> La artikoloj, kiuj enhavos personajn ofendajn disputojn;

5<sup>o</sup> La artikoloj, kiuj tute ne rilate al nia plano kaj fundamenta deklario.

Neniu manuskripto estos resendita al la aŭtoro, se li ne sendis poŝtajn markojn por ĝia resendado.

Ĉiu redaktoro estas responda pri siaj artikoloj.

La Redakcio estas responda nur pri la artikoloj subskribitaj de ĝi mem.

Nia revuo, havante, kiel ĉefan celon, la informadon pri la Socia Movado Ĉiulanda, ni tre insiste petas niajn kunlaborantojn, ke ili sendu al nia Redakcio ĉiumonate, ĉirkaŭ la 5<sup>a</sup>, resumon de la interesaj faktoj en sia lando: strikoj, kontraŭ-militarismo, revolucia, laborista kaj popola movado, k. t. p.

**Ili skribu tre legeble!! Kaj, se eble, per skribmaŝino.**

LA REDAKCIO.

## Niaj Kunlaborantoj

Argentina Respubliko: PAUL BERTHELOT. — Aŭstrolando: R. AUERBACH. — Belglando: EMILE CHAPELIER, GASSY-MARIN, JEAN NYS, G. SLÓUTSKY. — Bohemlando: JOSEF TEPLY, VACLAV MATINA. — Brazillando: NENO VASCO, STEFAN MICHALSKI. — Britlando: JOHN KENT, W.-W. PADFIELD, MARÉCHAL, HELEN FRYER. — Bulgarlando: STEFANO MINKOV, DIODONO, PETROV. — Ĉilio: X.... — Danlando: EINAR HAKANSSON. — Finlando: EINAR HAKANSSON. — Franclando: G. BASTIDE, BERLAND, FRANCISKO BUOKIN, RENÉ CHAUGHI, DELAHAYE, DUFOUR, FI-BLAN-GO, M. FRANSEN, R. LOUIS, MARIELLE, MERTZ, C. PAPILLON, VINCENT RICHARD, ROUSSET-GALHAUBAN, SEM, C. TD. — Germanlando: F.-J. HAVELKA, W. THIELKING. — Hispanlando: KAJETANO DEK, BRUNO GARCIA, NAVARRO, RAMIRO LOPEZ. — Holando: J.-L. BRUIJN. — Hungarlando: ZOCTAN BARANYAI. — Hindlando: AMOTOTO. — Itallando: ALBERT GALLOIS, ERRICO MALATESTA, LUIS CARLOS. — Japanlando: AMOTOTO. — Katalunlando: PERE SOLER. — Meksiklando: H.-F. SEXAUER. — Monako: TOSCA. — Norveglando: EINAR HAKANSSON. — Ruslando: AMIKO, BORISO KOTZIN, N. OR, MALNOVA RUSA

# INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTA LA KAJ ILUSTRATA  
PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON

Ĉion, kio rilatas al la  
ADMINISTRACIO

Oni sendu al  
R. Louis, *Internacia Socia Revuo*  
45, rue de Saintonge, Paris-3<sup>e</sup> (Francl.)

ABONPREZO :  
(Universala Poŝta Unuiĝo)  
Jare : 6 frankoj

(pageblaj laŭvole ĉiutrimonate Fr. 1.75)  
Abonantoj-Monofarantoj :  
Jare : almenaŭ 20 frankoj

Ĉion, kio rilatas al la  
REDAKCIO

Oni sendu al  
Fi-BLAN-GO, *Internacia Socia Revuo*  
45, rue de Saintonge, Paris-3<sup>e</sup> (Francl.)

## SEKRETA SOCIETO DE " DECEMBRISTOJ "



Milito inter Francujo kaj Rusujo (1812) havis por Rusujo duoblan signifon : ĝi faris grandan aliformigon en caro kaj samtempe faris grandan aliformigon en multaj rusaj oficiroj, kaj eĉ en soldatoj, estintaj postruslandlimo.

Caro Aleksandro I<sup>o</sup> revenis Rusujon kun penso plifortigi aŭtokratismen. Post milito kontraŭ Francujo ĉiuj Eŭropaj regnestroj kunvenis en Vieno kaj faris inter si « Sanktan Unuiĝon ». Ili devigis unu alian subtenadi aŭtokratecan potencon ne nur en sia propra regno, sed ankaŭ en fremdaj regnoj. Por tiu ĉi celo ili sendadis siajn militistarojn tiujn landojn, kie popolo ribeladis kontraŭ siaj reĝoj. Tiel ili sendis siajn militistarojn Italujon, en 1820, kiam tie ekflamis popola ribelo, kaj poste ankaŭ Hispanujon. Fremdregnaj soldatoj penetradis tiujn ĉi regnojn kaj restarigadis tie aŭtokratismen.

Sed ĉefa zorgo de kronitaj liganoj estis elradiki « liberan spiriton », kiel ili diradis, en siaj propraj regnoj. Kiel plej bona rimedo por tio ĉi ili konsideradis, unue, burokratian religion, kiu instruas pri senkontraŭparola, blinda obeado al estraro, kaj due, cenzuron por presajtoj.

Kaj jen, laŭ ordono de Aleksandro la, en Rusujo estraro komencis kulturajn falsan religian piecon. De ĉiuj estis postulataj vizitado de preĝejo kaj observado de preĝejoj ceremonioj. Kiu ne volis sin submeti al tio ĉi, tiu suferadis ĉiuspecajn persekutadojn. Ĉiuj lernejoj kaj universitatoj estis metitaj sub zorga observado de pastraro. Regnestro allasadis en lernejojn nur tiajn instruistojn, kiuj inspiradis infanojn al blinda obeado ĉiun estraron kia ajn ĝi estus. Kiu do el instruistoj ne volis tartufi, tiun oni senkompatate senoficiigadis. Krom tio, al tia homo minacis, por unu libera vorto, malliberejo aŭ ekzilo Siberion. Regnestro volis perforte altrudi al popolo sian burokratian religion.

Por tiu ĉi celo ĝi penadis haltigi popolan instruitecon.

Ĉe Aleksandro la estis fondita en Rusujo severega cenzuro por presajtoj.

Sed krom cara religio kaj malpermeso de libera esprimo de pensoj, ĉe regnestro estas ankoraŭ alia rimedo por subteni sian potencon : obeanta militistaro. Armeo ekzistas ĉe aŭtokratiaj reĝoj ne tiom por defendi regnon kontraŭ ekstera malamiko, kiom por defendi sian potencon kontraŭ propra popolo. Tiel cara regnestro antaŭ ĉio celas sufoki en soldato prudenton kaj konsciencan ; kaj tion ĉi oni povas atingi nur per timo. Estas necese, ke soldato kutimu timi estraron, ke li ĉiujminute trene antaŭ ĝi por sia propra vivo ; tiam li forgesos pri ĉio alia. Tion ĉi oni nomas militista disciplino.

Kaj jen, post sia reveno al eksterlandoj, Aleksandro la enkondukis en sia militistaro severegan disciplinon. Soldatojn oni komencis dresi dum tutaj tagoj ; samtempe oficiroj batadis ilin per pugnoj kaj vergoj, kiom volis eĉ sen ia kulpo ; kaj por malgrandega kulpiĝo malfeliĉajn soldatojn oni vergadis preskaŭ ĝis morto.

Ĉefan estradon de militistaro Aleksandro tiam transdonis al grato Drakĉejev, kruela homo lasinta post si malbonan memoron. Tiu ĉi estis vera ekzekutisto ; en lia koro neniam maldormiĝis kompato ; al li estis bagateo mortigi homon per bastonaj batoj. Okazadis tiel, ke soldaton oni pelis tra vico de armitaj per vergoj soldatoj, unufojon ĝis perdo de konscio, poste oni forportis lin malsanulejon, kuracis iel lian elbatitan dorson kaj denove pelis lin tra sama vico nun jam ĝis morto. Ifoje oni elbatadis per bastonoj jam mortan korpon por elkalkuli plenan mombonon de difinitaj batoj. Jen per kiaj rimedoj caro Aleksandro la volis prepari por si obeantan militistaron.

Kun tute aliaj pensoj revenis el postruslandlimo multaj rusaj oficiroj. Post tio, kiel ili estis en liberaj landoj, al ili ankoraŭ pli malfacile estis vidi rusan vivadon kun ĝia servuta rajto, kun ĝiaj vergoj kaj bastonoj, kun ploro kaj ĝemoj ĉirkaŭ. Unu oficiro rakontas, ke dum militista revuo, post reveno Rusujon, li ekvidis kiel polico

batis popolon dezirintan pli proksime aliri al staranta militistaro. Poste li ekvidis caron rajdintan sur strato, kaj saman minuton laŭlarĝe strato trakuris la vilaĝano. Tiam polico sin direktis al tiu vilaĝano kaj antaŭ okuloj de caro elbatis lin per bastonoj ĝis duonmorto. Tiaj scenoj okazadis en Rusujo ĉiuminute kaj ĉiuloke. En rusa imperio reĝis vergo kaj bastono. Sur vilaĝanaro ŝarĝe kuŝis servuta rajto kaj tuta rusa vivado estis fundamentita sur tiu ĉi sklaveco de vilaĝanaro. Esperu je Aleksandro I-a oni jam ne plu povis; ĉiuj liaj promesoj estis nur nekredindaj paroloj.

Kaj jen, baldaŭ post reveno de rusa armeo el postrusland-limo, en 1816, en Rusujo formiĝis, precipe inter oficiroj, sekreta societo, kiu estis nomita: « Unuigo de Bonstato ». Laŭ statutoj de tiu ĉi societo ĝiaj anoj devis labori por bonstato de Ruslando. Ĉiu el ili devis ricevi oficon kaj peni por okupi ian gravan servon tiel, ke siatempe ĉiuj superaj oficoj estu en manoj de sekreta societo. Fine, estis decidite, ke se imperiestro ne donos iajn rajtojn al popolo, neniaokaze juri al lia heredonto, ne limiginte lian aŭtokratecon.

Ĉefaj anoj de tiu ĉi societo sekreta estis: kolonelo Pestel, kvar fratoj Muravjov, el kiuj unu estis kolonelo, du estis subkoloneloj kaj unu estis kapitano, eks-leŭtenanto Zilejev, kolonelo princo Trubeckoj, generalo Fonvizin, kolonelo Davidov, generalo princo Volkonskij kaj multaj aliaj. Entute estis en tiu ĉi sekreta societo tri generaloj, dudek ok regimentaj aŭ batalionaj komandantoj kaj sepdek ok oficiroj de malsuperaj klasoj. Estis inter ili ankaŭ ne militistoj: Nikolaj Turĝenev, servinta en Regna Konsilejo, Juŝnevskij, Puŝcin, princo Odojevskij kaj aliaj.

Tiu ĉi sekreta societo ekzistis ĉirkaŭ dek jarojn. Dum tiu ĉi tempo ĝiaj anoj sukcesis fari multe da bonajo. Ili ĉie defendadis ofendintojn, aranĝadis en vilaĝoj lernejojn, forigadis el uzado korppunojn: kelkaj el ili eksigis en siaj bienoj servuton kaj klopodis priliberigo de siaj vilaĝanoj. En « Semjonevskij » regimento, dum en ĝi rotaj komandantoj estis anoj de sekreta societo, pri vergoj kaj bastonoj ne estis eĉ rememoro; same estis ankaŭ en kelkaj aliaj regimentoj. Unuvorte, ĉiu ano de sekreta societo, sankte plenumadis prenitajn sur sin devon: laboradi per ĉiuj fortoj por bonstato de Ruslando.

Sed sekreta societo havis pli gravan celon: aliformigi politikan ordon Ruslandan, limigi aŭtokratismen kaj liberigi vilaĝanaron. Ili atendis nur oportunan okazon por alpaŝi al afero. Ili konsideris, ke multaj el ili komandis regimentojn kaj rotojn, en kiuj soldatoj amis ilin kaj estis pretaj sekvi ilin fajron kaj sagon. Laŭ ekzemplo de jam estintaj en Ruslando regnaj revolucioj, ili intencis, kun helpo de sindonaj al ili regimentoj, aresti regnestraron kaj devigi caron rifuzigi de absolutismo, kaj poste kunvenigi konstituanton. Ĉefajn militistajn fortojn ili havis en suda armeo, dislokigita en kampoj: — Podolsk'a kaj Kijev'a gubernioj. Tie servis kiel adjutantato ĉe ĉefkomandanta milita marŝalo Pestel, kiu mem komandis Vjatka'an regimenton; tie same komandis regimentojn Artamon Muravjev, Svejkovskij, Miŝkov, Avramov kaj Norov, — ĉiuj anoj de sekreta societo. En difinita tempo ili devis izi kun siaj regimentoj Peterburgon, kunigi tie kun anoj de norda fako de sama societo kaj ekposedi palacojn.

(Daŭrigota.)

Esperantigis Danielo MORGANO.

## TEORIO DE L'ARMADO

“ “ “

Jen interparoladeto inter najbaroj, kiu bone montras la absurdon de la teorio: « Si vis pacem, para bellum ». Ĝi estas verkita de nia malnova kamarado Domela Nieuwenhuis. Mi rimarkigos, ke nia senarmigema (!) kolego « Espero Pacifista » rifuzis antaŭ kelkaj monatoj ĝin presi.

« Najbaro A. — Kara najbaro mia, kiel mi estas kontenta, ĉar ni ĉiam vivis en bona interkonsento! Tial mi aĉetis bonan bastonon, rigardu do!

Najbaro B (atente rigardante la bastoneton). — Efektive, jen bona vergo. Per tio oni mirinde povus krevigi kranion. Kiel estas feliĉe, ke pace ni vivas! Do, tuj aĉetos mi ankaŭ similan bastonon, kvankam mi pli bezonas mian monon por la mastrajo. »

Iom pli malfrue.

« Najbaro A. — Vidu, kara najbaro! Mi senposedigis min pri mia bastono, ĝin donante al iu, kiu estas malpli civilizita, ĉar buĉi per bastono estas tro groteska agmaniero. Jen glavo, kiun oni multe pli facile manumas, kaj kiu estas multe pli eleganta. Mi estas tiel kontenta, ĉar mi tiel bone interkonsentas kun miaj najbaroj, kaj pace ni ĉiuj vivas.

Najbaro B (atente rigardante la glavon). — Jes, certe, estas ja feliĉe, ke ni estas Kristanoj: Kristanismo estas Amo kaj Paco. Do, mi tuj dece havigos ankaŭ al mi glavon. Bastono..., tio estas iom... sendia. »

Post kelkaj tempoj.

« Najbaro A. — He! najbaro mia, venu do por vidi! Rigardu! mi havas pafilon. Tio estas multege pli efika ol glavo. Tamen tiun ĉi mi konservas, ĉar niaj rilatoj estas tiel pacemaj. Sed mi prenas ankaŭ la pafilon.

Najbaro B (atente rigardante la pafilon). — Bone! Mi ankaŭ tuj aĉetos pafilon. »

Reveninte hejmen. B diras al sia edzino:

« Donu al mi kelkajn florenojn por aĉeti pafilon.

La edzino. — Ĉu vi estas freneza? Pafilon? Mi eĉ ne povas aĉeti vestojn por la infanoj!

B. — Nu, prunteprenu iom da mono!

La edzino. — Nenion plu mi havas por doni kiel garantiaĵon.

B. — Niaj infanoj pligrandiĝas kaj plifortiĝas. Ili pagos la ŝuldon, kiun ni faras, kaj ili donos parton el la produkto de sia laboro por pagi la procentojn. »

La infanoj krias:

« Ni estas tiel malsataj!

B. — Silentu! Mi ne povas toleri la malkontentecon. Mi amas la liberecon, kaj al ĉiu el vi mi permesas estis malsata tiom, kiom plaĉos al li, se nur li ne ekfariĝas malkontenta. »

La patrino kaj la infanoj ekploras, kaj por pura amo al la Paco, ili ricevas zorgitan batadon.

Kaj tio daŭras inter la du najbaroj. Ili armas kelkajn el siaj infanoj, por pli bone vivi pace, kaj por batigi la aliajn infanojn, kaj ilin mortpafigi de iliaj fratoj armistaj, kiam la mizero ilin instigas ribeli kontraŭ la aŭtoritato.

Tiel la diversaj familioj daŭras vivi en mizero. Ĉiam oni aĉetas novajn armilojn, por kiuj oni ĉiam trovas la necesan monon, sed al la malsateguloj, oni rifuzas panon. Ĉiujn jarojn, la najbaroj kunvenas por doni al si reciproke la certigon, ke estas inter ili perfekta interkonsento, kaj ke la paco ne riskas esti konfuzita. »

Nu, kion oni dirus pri najbaroj, kiuj tiel agas? Oni ilin enmetus ĉu en frenezulejon, ĉu en malliberejon.

Tamen la rilatoj inter regnoj estas ĝuste la samaj. Ili pruvas siajn pacemajn intencojn, puŝante ĝis la frenezo la militajn elspezojn kaj la armeajn kontingentojn. Sed ĉiujare la popoloj aŭdas similajn paroladojn faritajn ĉe la Parlamentoj aŭ ĉe ia Haga konferenco. Kiam la popoloj opinias, ke ili pli bezonas vivigilojn ol mortigilojn, kontraŭ ili agas la registaroj sammaniere, kiel la najbaroj agas kontraŭ siaj infanoj, kaj tio eĉ okazas en la « Plej dolĉa el la Patrujoj » de S<sup>ro</sup> René Viviani. Ho! kiel do oni devas agi en la « malplej dolĉaj »! Tio verŝajne estas terura!

FI-BLAN-GO.



## La Revolucia movado en Anglujo

“ “ “

Se per la vortoj « movado revolucia » oni komprenas elementojn (individuoj aŭ grupoj) kombinitajn per la rapida ŝanĝo, eĉ per batalo perforta, de la nuna stato de la socio, mi devas, kun bedaŭro, konstati ke ĝis la nuna horo ne estas vidita en Anglujo tia movado, kiu estu preparolinda.

La anarhistoj, en tiu lando, estas malmultaj kaj sen ligilo inter si, krom « Freedom », kiu aperas nur ĉiumonate. La plimulto el la kamaradoj, kiel Mainwaring, Turner, Legatt, Paker, k. t. p., estas membroj influaj de la « Trade-Unions », « labour leaders », kiuj desikas siajn penadojn, en la manlaboristaj societoj kies anoj, ili estas provi komprenigi al siaj kamaradoj :

1° La neceson aliformigi radikale la nunan socian ordon kaj ; 2° ke la ĝenerala striko estus rimedo multe pli efika, por elfari tiun aliformigon, ol la riprezentada de la aferoj proletariaj ĉe la Parlamento kaj ĉe la

diversaj urbaj estraroj elektitaj tiokio, de la nova formigo de la « Labour Representation Committee », estas la metodo alprenita de la Trade-Unions.

Ĝis nun, la penadoj de tiuj kamaradoj ne saĝnas esti havinta tiom da sukceso kiom ili meritis. Sed rapida ŝanĝo en la ekonomiaj kondiĉoj de la lando igas pli fruktodona la kampon, sur kiun ili semas. Tiu ŝanĝo rezultas el kelkaj kaŭzoj, inter kiuj la ĉefaj estas la vastiĝo de la industria konkurenco germana, amerika, kaj, ĝis ia grado, azia (hinda kaj japana) kiu forpelas pli kaj pli Anglujon sur la plimulto el la vendurbejoj, kie ĝi antaŭe estis superreganta ; la amasiĝo de la publika riĉeco en nombro da manoj pli kaj pli malgranda, kaj fine la malŝparego ŝipara kaj milita, kiu englutas la plej bonajn provizojn de la lando.

La unua el tiuj kaŭzoj, kunigata kun plimultiĝo rapida kaj konstanta de la loĝantaro produktas, kompreneble, periodan mankon da laboro, kiu senĉese igas pli granda.

La dua, la pligrandiĝo de la nombro de la milionuloj, forpelas la kamparan loĝantaron al la urboj, kie ili venas pligrandigi la nombron de la senlaboruloj. Ĉiu nova riĉiĝinto, efektive, havas nur unu deziron, tuj kiam lia « fadenvolvigo » (France : pelote, t. e. monamaso) estas farita : starigi aristokratian posteularon. Li ricevas la titolon « baroneto » aŭ « lord » tiel facile kiel en Franclando li dekretoĝigis la Honoran Legion. Tio estante farita, li aĉetas terajn bienojn (« estate » kiel oni diras tie-ĉi), kaj forpelas la kulturistojn el la kampoj, kiujn li bezonas por krei parkojn kaj arbarojn ĉasejajn. Ĉiujare, tiu surkroĉiĝo sur la supraĵo kulturata de la lando estas kalkulebla po centmiloj da kvadrataj kilometroj kaj farigas tiel maltrankviliganta ke eĉ la moderaj politikaj partioj sin montras malkvietaj pri ĝi kaj projektas kontraŭagi per legaj decidoj.

La tria kaŭzo, la malsaĝegeco ŝipara kaj milita estas elmontrita per komparo inter la budĝetoj de 1896 kaj de 1906. En la unua, la ŝiparaj elspezoj atingis 19,724,000 funtoj kaj la militaj elspezoj 18,460,000 funtoj ; en tiu de 1906, ili supreniris ĝis 29,813,000 kaj 33,389,000 funtoj, tio estas sumo pligranda ol milmiliono kaj duono da frankoj ĉiujare. La sargegoj impostaj, sekve, igas pli kaj pli subpremeganta, tion, kio reagis rekte sur la prosperado de la lando.

La Angla manlaboristo estas inteligenta kaj ju pli la nunaj kondiĉoj vastiĝos, des pli li komprenos ke lia savo estos en socia revolucio kaj ne en plibonigo de la nuna socia sistemo. Ĝis la lastaj jaroj, li okupis, en la Eŭropa proletariaro, privilegian situacion ; li gajnis salajrojn riĉate altajn, li suferis malmulte pro senlaboro, li provizis sin po malaltaj prezoj je la necesajoj de la vivo dank'al la libera intersanĝado,

kaj li vivis en la lando, kie estas plimulte da libereco, kie oni tiel malmulte sentas la pezon de la aŭtoritato ke oni povas kredi ke ĝi ne ekzistas. Oni ne vidas en ĉio tio-ĉi kondiĉojn, kiuj kutime faras revoluciulojn. Sed, kiel mi tion elmontris supre, tiuj kondiĉoj sanĝiĝas kaj, samtempe, la vidmaniero de la proletario ankaŭ sanĝiĝas. Ĉio montras ke post malmulte da jaroj ekzistas en Angolando movado revolucia tiel forta kiel en ĉiuj aliaj landoj.

TARRIDA DEL MARMOL.  
London, 16 decembro 1906.  
(Trad. C. Td.)

(La Guerre Sociale.)

## La Rusa Revolucio kaj la Alkoholo

“ “ “

Folioj, kolektitaj de Gustavo Schwengeler en Hegi-Winterthur, Svislando.

La historiuloj, kiuj iam priskribos la nunan rusan revolucion, devos dediĉi al alkoholo, kiu ludas tiel gravegan rolon en ĝi, apartan, ne seninteresan ĉapitron; ĉapitron tre riĉan je rimarkindaj okazintaĵoj, ĉapitron, kiu estos monumento en la sociologio de l'alkoholo. Kvankam ne estas jam eble, doni plenan, sencensuran, tute certan bildon pri la rolo de ebrigaĵoj trinkataj dum la « ribelado », ni tamen estas rajtigitaj, konkludi kelkajn faktojn. La ĉefpunktoj, sur kiuj ni konstruis tiujn ĉi artikolojn estas la sekvantaj.

1e.) Dum la revolucio servas la alkoholo kiel ĉefrimedo, la soldatojn, precipe la kozakojn rekom-pencatajn por faritaj kruelajoj.

2e.) En la tuta Rusujo konigis la « ribeluloj » la ŝtatan brandomonopolon kiel la plej enspezdonan potencigan fonton de ekzistanta regimo, tonton kaj rimedon por degenerigi, malsaĝigi, indiferencigi kaj subpremigi la popolon. Pro tio sisteme la revoluciuloj detruas la brandprovizojn kaj « monopoldomojn ».

3e.) En la regionoj, kie ekzistas firme organizitaj ribelemulaj unuigoj (Polujo, Litvujo, Finnlando, Estonio, ktp.) oni propagandas la batalon kontraŭ alkoholo kiel rimedon, atingi la liberecon, kaj batalas pro tio kontraŭ alkoholo per aparta energio.

4e.) En Finnlando staras la « prohibicio » (tuta forigo de alkoholaĵoj trinkataj) sur la programo de l'socialista laborista partio. Jam nune, ĉe gravaj okazintaĵoj, kun mirindaj sukcesoj proklamas la partio la « prohibicion ».

Multaj kamaradoj, precipe el Sud-Eŭropo, ride-

tante mokas tiujn el siaj sampartianoj, kiuj partoprenadas en la batalego kontraŭ alkoholo. Sekvantaj sciigoj donu al la ridantoj kaj mokantoj okazon iom pripensi la situacion, kreitan per la fortegoj de l'alkoholo. Mi rimarkigas ke la rolo de malsobrigaj trinkakajoj ĉe ĉiuj aliaj okazoj (vidu la francajn revoluciojn) estas la sama, aŭ preskaŭ la sama.

### 1e. POLUJO.

La brando estas tre ŝatata, gravega regalilo de l'Rusa militarismo.

La rusa soldato, kvankam iom kredema estas tamen bonema. La sangavida besto li farigas per la brando. Ĉiuj buĉadegoj, okazintaj en la urboj Warszawa, Lodz, Bjelostok, Kremenĉing kaj aliaj havis la antaŭkondiĉon, ke la soldatoj kaj iliaj oficiroj antaŭe per amaso da brando estis regalitaj kaj nur en la ebrigeeco estis pentitaj al la logantaro. (Vidu: « Le Bien social », Bruxelles, Nov. 1905.) En tia stato, la soldataro estis kapabligita fari ĉian ajn kruelegecon. La plej neimageblaj teruroj farigis veraĵoj. Ekzemploj: La gan de Februaro 1905 okazis la buĉado de la minejo, nomita « dometo de Katarino », proksime de Sosnoviec. La tutan tagon la soldatoj estis regalitaj per brando, poste, grupiginte oni starigis ilin ĉirkaŭ la minejo kaj kiam alvenis pli granda amaso da strikantoj (en tiuj tagoj strikis preskaŭ la tuta pola laboristaro) en la komenco, la soldatoj montris malmulte da volo pafi) krakadis samtempe, de ĉia flanko pafoj. 37 laboristoj falis mortigite senkonscie, sangigite teren. La postan tagon 20 da ili estis enterigitaj; la ceteraj restas malaperigitaj. La malsobrigita soldataro sendube jetis ĉiujn pafitajn laboristojn kiuj ne jam estis malvivaj en la brulajn fornegojn!!! La fakto konatigis, la laboristaro juris venĝegon.

Ĉar la situacio estis tiel fatala, la Varsovia laborista komitato de la Pola socialista partio, antaŭvidinte novan buĉadon ne faris la gan de Majo 1905a pli grandan publikan elmontron tra la stratoj, sed nur malgrandajn en la laboristaj kvartaloj. Ankoraŭ pli singarde agis la « juda laborista asocio », dezirinte ĉian elmontron. Sub la nomo: « Litvuja kaj Poluja socialdemokratio » ekzistas plimalgranda organizacio, kiu kredis, la agoj de la ambaŭ aliaj organizacioj estu signoj de mankanta kuraĝo. Ĝi volis kontraŭmeti ĝian propran kuraĝon. Portante 5 grandajn flagojn, la anoj de S. P. kaj L. rekte marŝadis al la centro de l'urbo. La irado kaŭzis mirindajn. Miloj da viroj, virinoj, infanoj aliĝis al la irantaro. Ĉiu estis konvinkita, ke ilia grandnombro timigos la kontraŭulojn. Sed, kion ne estus farinta alia registaro faris la Rusa. En la proksimo de tienomita: « Viena stacidomo » ĉirkaŭis kozakoj la irantaron kaj pafis, pafadis, pafe-

padis, ĝis pli ol cent homoj kŭsiĝis en sia sango. Eĉ la fiŝoldataro persekutis la forkurantojn ĝis en la vestibloj kaj hakis junajn knabinojn per glavbatoj en pecojn. Eĉ infanetoj en la lulilo ne estis indulgataj. Por ĉiuj tiaj heroajoj la kozakoj estis rekompencataj per brando; multe da brando!!!

**Firegistar!** — La saman vesperon sidis grupo da « venkintoj » antaŭ la stacidomo ĉirkaŭ — barelo da brando — nerimarkante, ke la stratoj pli kaj pli senhomigas. Subite, bombo, jetinta meze en la drinkantojn eksplodas kaj mortigas 6 kozakojn. Kiam la ceteraj kozakoj rekonscienciĝis, ili blinde pafadis en la stratojn, ne vidinte ke ili mortpafis siajn proprajn kamaradojn, kiuj alvenis scivoleme, allogitaj de krakado. 28 kozakoj estis tiamaniere mortpafataj. Kiel venis ilia diableco. La alian tagon per afiŝoj konatiĝis, ke la bombon jetis membro de Pola socialista partio, pro venĝo. Memkompreneble, per tiaj okazintaĵoj la batalo kontraŭ alkoholo gajnis pli grandan forton, tute novan vidigon. Antaŭ la revolucio neniu el la socialistoj agitatoroj deziras partoprenadi aŭ eĉ propagandi kontraŭ alkoholo. La rusa cenzuro ja **APROBIS!** kelkajn broŝurojn, enhavantajn alkoholkontraŭan emon. Sed la broŝuroj elverkigitaj de rusaj oficiroj, aŭ montrinte nomojn de eksterlandanoj ne trovis tre ameman akcepton. Nature! la organizita laboristaro ne interesiĝis pri ili. Ankaŭ la Pola socialista partio disdonis la, en eksterlando presitan « Swiatło » (la lumo), kiu enhavis dufoje artikolojn alkoholkontraŭajn (Sciigo de Dov. Gumpłowitz; la verkinto). En Krakovio aperis (aŭ aperas? L. V.) la broŝuro: Pjanstwo nasz wróg (la trinke-meco-nia malamiko).

Granda nombro da tiuj broŝuroj estis kiel kontrobandaĵoj portitaj trans la rusan landlimon kaj trovis jam pli bonan akcepton. Sed, senpera sukceso ankoraŭ ne estis atingita. Sed plene sukcesis la klopodoj, tute neatendite, dum la ĝenerala striko en Januaro kaj Februaro 1905a. La strikantoj detenis sin dum la tuta daŭro de striko de ĝuado de ĉia ajn alkoholhava trinkaĵo. Ne pro higienaj motivoj, sed pro politikaj ni povas registri tiun ĉi admirindan sukceson. La popolo ekkonis ke la ŝtata alkoholmonopolo nun utilas kaj ribigas la malestimatan, krueleman perfidan regimen, registaron. Sed, post tia sukcesego, la estraroj de diversaj « ribelemaj » partioj ne igis plu trankvila la movadon. Tamen ni lernis, ke tiu ĉi, tute nova alkoholkontraŭa ago, naskiĝinta el la revoluciema memstarigo de la subpremata laboristaro montras, ke sen alkoholhava nia batalanta proletariato multe pli formiĝas, ke ĝi fariĝas fakto, kun kiu devas kalkuli la subpremanoj!

Kuriozaĵo estas, ke eĉ la burĝa radikala inteligentularo decidis apogi la fontan movadon de « niaj fratoj, amikoj! » Kiel devinte, la motivoj de tiu ĉi alkoholkontraŭeco ne estas la konvinko pri la malutilo de alkoholo trinkata; sed se mi pripensas, ke biero nur tre malotte estas trinkata de la Pola laboristaro, ke vino tie estas preskaŭ nekonata, ĉar ĝi estas tre multkosta, ni tamen kaj ĝojege povas konstati, ke la Pola laboristaro batalis kaj gajnis gravan batalon, pri kja gajno ni sincere kaj amike ĝin povas gratuli. La unuan paŝon la Poloj faris, esperu ni, ke ĝi antaŭeniru plirapide.

(Daŭriĝos)



## La vilaganoj agristoj en Rusujo (1861-1906)

(SEKVO.)



De l'XIX-a jarcento Rusujo komencas preni parton en la komerco kun la alilandoj. La industrio malvoviĝas. Havinte en 1765 cirkaŭ 260 fabrikojn kun 38.000 laboristoj, preskaŭ ĉiuj servutuloj, Rusujo pose en 1854 10.000 fabrikojn kun 460.000 laboristoj. Sed en la komenco de XIX la fabrikistoj preferas liberajn laboristojn je servutuloj. En 1801 la nombro de liberaj fabrikoj (46.600) egalas tiun de laboristoj servutuloj. La lasta fakto havas grandegan signifon. La industriistoj, laborintaj kun liberuloj, komencis konkuri kontraŭ la servutaj fabrikejoj, kiuj estis ĉie venkataj: la rezultatoj de la libera laboro superis tiun de la servuta. La fabrikado de la bienuloj sklavhavuloj komencis fali. Aliflanke, la kreskanta klaso de industriistoj, laborintaj per liberuloj, ne havis sufiĉe da « manoj »: pli kaj pli laŭtiĝis la murmuro pri la « malprofiteco » de la servuto, kaj la caro Nikolao I mem diris ke « la servuta institucio estas la kaŭzo de malesto de komerco kaj de industrio ». Ne sole la fabrikado, sed eĉ la terkulturado fariĝis neebla en la malnovaj kondiĉoj. « La eksperimentoj — skribis la reacia ministro Perovski en 1845 — montris en la gubernioj de Saratov, de Tambov, de Voronej k. a. ke tiuj laboristoj gajnas super la servutuloj. »

Al tio ĉi la ministro aldiris ke la bienuloj komencas kompreni la premon, praktikatan sur ili de la servutuloj: la oftaj malbonrikoltoj kaj la devo senpage (*tiel!*) nutri la vilaganojn en tiaj akcidentoj estas tre pezaj; la vilaganoj, apartenantaj al la bienuloj, fariĝas malzorguloj kutimante vidi en ili siajn naturajn nutristojn. — Oni vidas ke la ekonomia evoluo faras breĉon en la servuta institucio, ĝis tiam benata de l'eklezio sub la muziko de l'aŭtokratia knuto.

Super la ekpuro de la sociaj interrilatoj komencas brili la malnova, sed ĉiam nova fetiŝo, la ora bovido: la interpuŝigo de Rusujo kun la alilandoj, precipe kun Anglujo, faras novan truon en la natura mastrumado, kiu estas forpuŝata de la mona movado. Por la novaj entreprenoj, por

la fabrikejoj, por la eksporto de grenoj, de linoj k. c., por la importo de kotono aŭ de pretaj produktoj oni bezonis monon. Ĝi estis trovita. « Frapu, kaj oni malfermos al vi. » Se en la komenco de XIX la hipoteke ŝajnis afero komplika kaj tro kuraga, la plua situacio montras ke la bienuloj rapide perdis sian patriarkecan timemon. En 1843 la regna banko pruntedonis monon, garantiitan de bienoj kun 3 375 315 viroj servutuloj (54 % de ĉiuj viroj servutuloj), kaj tiu ĉi nombro atingis en 1856 la ciferon de 6.028.794. Por tiu mono oni devis pagi procentojn. De kie ilin preni, se la servuto, la natura mastrumado, donis nur malmulte da profito, dum la kapitalo, kreata de liberaj laboristoj venke konkuris kun la servuta mastrumado?

La rusto de la sociala stato komencis profunde manĝi eĉ la « monopolistojn de la preĝo », la ekleziulojn. La plej atakita estis, kiel ĉie, la malsupera eklezio. En la antaŭa tempo, dum la natura mastrumado, la vilaĝaj pastroj tiel aŭ alie vivetis kaj faris siajn aferetojn, sed nun, de l'enkuro de la novaj fluoj de l'okcidentaj landoj, la riprezentantoj, de de la ĉiela regiono estis senteble premataj de la teraj kondiĉoj: se antaŭ tiam « la konsumataj valoroj » havigis en la lando grandkvante kaj, ne kurante alilandon, restadis dome kaj subtenis la sanktajn stomakojn de la makleristoj inter Dio kaj la popolo, de nun la samaj « konsumataj valoroj » ricevis mirindan econ moviĝi kiel hidrargo kaj transsubstanciĝi en la oran bovidon. La « donacoj », fari-taj antaŭ tiam al la ekleziuloj, forglitis nun el iliaj manoj alilandon, kaj la popoloj, renversitaj de la nova dio simile la Asodda Dagon, falis en la mezon de la proletarioj kaj iris multigi la armeon de la inteligentaj nemihavuloj. Kio koncernas la superan klason de l'ekleziuloj, ili certe ne malsatis, sed estante siavice bienuloj, ili subfalas la ĝeneralan malorganizigon de la agrara aristokratio.

La naskiĝo de la nova ordo estis ankaŭ akompanata de diferenciado en la mezo de la nobelaro de la alta sfero. Inter la malriĉaj nobeloj (en la nombro de 106.000) multaj nome 17.000 tute ne posedis agron, havinte nur servutulojn en la kvalito de servistoj. Tiu ĉi klaso, laŭ la diro de princo Vasilĉikov, faris en la 30-aj kaj 40-aj jaroj de XIX grandan progreson en sia klereco: ili vizitis la universitatojn kaj formis en sia mezo sciencistojn, literaturistojn kaj instruitajn kronoficistojn, kiuj riprezentis la ĉefan opozicion inteligentan kontraŭ la servuta institucio kaj kontraŭ la grandagra aristokratio. Tiel ĉio konspiris kontraŭ la servuto, la fabrikistoj, la ekleziuloj, la inteligentuloj, eĉ la ministroj kaj la caro mem. La fabelo pri la « volonta » liberigo de la servutuloj aperas sub la vera lumo...

(Daŭrigota.)

AMIKO.



## PRIPENSADOJ PRI LA INDIVIDUALISMO (1)

(SEKVO)

» » »

II

### La individuo

Tiel, kiel komprenas la individualista filozofio, la individuo, potenca kapableco pri soleco kaj aŭtonomio, ne estas, metafizika formulo; ĝi estas, kiel kredis Fichte kritikante « la Ununuro » de Stirner, unu « Mi'o » mistika, abstrakta, kies ridinda kaj pereiga kulto finiĝus ĉe la neado de la socieco, kiu estas tamen bezono konstatita ĉe la homo. Kun tiu religia karaktero tute speciala, la individualismo finiĝus ĉe malsprita izolo tiel kiel ĉe barbara kaj senĉesa batalo, kie la homo perdis la tutan akirajon prapatran kaj la tutan eblecon progresadi. La kulto de tiu « Mi'o » abstrakta naskus la sklavecon, same, kiel el la kulto de la Regnano — La Homo de la pozitivismo — naskiĝis la moderna sklaveco, karakterizita, per la unuigema kaj solidarema devigo de la nuna socio, kiun altrudas la Stato al la individuoj.

Certe ne la « mi'o » individualista ne estas abstrakto, spirita principo, ideo; ĝi estas la « mi'o » korpa kun ĉiuj ĝiaj kvalitoj: apetitoj, bezonoj, pasioj, interesoj, fortoj, pensoj, k. t. p. Ĝi ne estas « La Mi'o », ideala; ĝi estas mi, vi, li, precizaj realaĵoj. Ĝi estas realaĵo pro tio, ke jam ĝi estas trege diversa, ĉar ĝi ŝanĝiĝas kun ĉiu individuo. Tiel la individualista filozofio faldiĝas laŭ ĉiuj individuaj ŝanĝoj, tiuj ĉi havante kiel kaŭzon la intereson, kiun la individuo donas al la faktoj kaj al la aferoj kaj kiel reguligilon la potencon, kiun li disponas. Ĝi fondas per tio mem naturan harmonion, pli veran kaj pli daŭreblan ol la nenatura harmonio kaj tute supra ŝuldata al la religioj, al la moralaj dogmaj kaj al la leĝoj, ruzaj fortoj, al la armeoj, al la policoj, al la malliberejoj kaj al la eŝafodoj, fortoj de perforto, kiujn disponas la aŭtoritatoj.

La individualismo sin movas nur en la bieno de la realo, de la logiko, de la racio-pasia, de la senteblo. Ĝi eljetas ĉian metafizikon, ĉian dogmon, ĉian religion, ĉian kredon. Ĝiaj rimedoj estas la observo, la analizo, la rezono, la kritiko, sed nur konsultante criterium' on elvenantan el si mem kaj ne tiun kiun ĝi ĉerpus el la kaŭzo opa en honoro en la mezo, ke la individualisto fondas sian juĝon. La individualismo eljetas la absoluton, ĝi zorgas nur pri la relativo. Fine ĝi lokas la individuon, solan vivan realaĵon, kapablan je aŭtonomio, kiel centron en ĉiu morala, socia aŭ natura sistemo.

— Certe, sinjor' profesoro de moralo, nia umbiliko estas la centro de l' mondo, kiel vi diras kiam senatente vi ironietas. Ĝi estas la centro de l' mondo por ĉiu el ni, individualistoj, tiel, kiel por vi sinjor' sklavulo, aŭ prefere sklavo; nur ni tion diras laŭte, dum vi tion kaŝas zorge instruante la malon.

(1) Vidu la 1 an numeron.

Mi estas por mi, vi estas por vi, li estas por si la centro de l' mondo!

Ne ridu. Samtempe kiam Dio perdas en ĉiu el ni tiun pretendon longatempe konservitan esti la centro de l' mondo, la celo de niaj agoj, la kaŭzo uzurpanta de nia agemo, — samtempe ĉiu ekkaptas tiun ĉi pretendon por si mem. Sed por tio, estas necese, ke antaŭe ĉiuj absolutaj metafizikuloj, kiuj estas nur diaj aliformigoj, realiru Dion en ĉiun nebulan forkuron de fantomo iom groteska. Nia preĝendo krias tiam la seninterrompon de la relativo, — de la relativo al nia « mi'o », nature.

— Kien vi lokas, vi, mia kontraŭulo kristana, la centron de l' mondo?

— En Dion.

— Kaj vi, sinjor' pozitivistoj, sinjor' « ateistoj », kiu kredas ne kredi al Dio ĉar vi englutis la malreligian kolbason de la sankta vendredo? (1)

— ....

— Vi jam ne scias kiun elekti el la diversaj hostiuloj, kiu prezentigas al viaj okuloj.

Centrojn de l' mondo, vi povas revendi! Kaj ĉiuj estas tiel fremdaj unuj kiel la aliaj al vi mem. En la bieno de la sankteco vi havas nur la embarason de la elekto, vi povas laŭvole rampi ĉirkaŭ tia aŭ tia centro, laŭ la okazo. Tial vi estas la sama kompatindulo, se ne pli malbona, kiel via najbaro la diisto, kiu almenaŭ konas nur sian solan Dion. De la mondo kie vi moviĝas, vi lokas la centron ĉien escepte tien, kie ĝi estas, kaj kie vi devus ĝin vidi: en vi, vi estas pri via propra volo, — ĉu vi havas almenaŭ volon? vi estas pri via volo de nekonsciulo nur malfeliĉa sekvulo, kiu turnas senĉese ĉirkaŭ eraraj centroj, kiuj aperas al viaj okuloj pli-malpli diaj.

Dum tiu tempo, la religiaj kaj ne religiaj pastroj de ĉiuj kultoj faras sian laboron de brutigado kaj senmonigado.

Mi, la individualisto, mi estas la centro de ĉio, kio ĉirkaŭas min. Tiel mia elspezo da agemo, ĉiuj miaj rezonitaj agoj kiel pastiaj, medititaj kiel propramovaj, havas celon, kiu estas ĉiam persona kontenteco. Kiam mia agemo sin direktas al aliulo, mi estas certa, ke fine ĝia produktajo materia aŭ morala revenos al mi. La alia do povas fari, ke tio estu simile por li. Mi havas moralon personan kaj mi ribelas kontraŭ La Moralon; mi praktikas personan justecon kaj mi rifuzas la kulton al La Justeco, k. c.

Ho frato mia! mi estas la saĝulo kaj vi estas la frenezulo, mi estas la libera homo kaj vi estas la sklavo, mi estas la ĝoja homo kaj vi estas la ĉagrena homo....

(Daŭrigota).

Manuel DEVALDÈS

Trad. R. Louis.

## Sociaj kaj politikaj partioj ĉiulandaj

“ “ “

### Laboristaj Organizacioj kaj Prolaboristaj Institucioj en Svislando.

Niaj eksterlandaj kamaradoj ordinare ne bone komprenas la agadon, bataladon de l' Svisa laboristaro. Kutime la eksterlandano kredas, ke Svislando estas unu sola ŝtato. Ne! Svislando estas Konfederacio, konsistanta el 25 kantonoj (19 kantonoj, 6 duonkantonoj); la kantonoj estas tute memstaraj ŝtatoj, el kiuj ĉiu havas siajn apartajn leĝojn, konstituciojn. En Svislando regas kvar naciaj lingvoj, la Germana en norda, orienta kaj centra Svislando, la Franca en okcidenta Svislando, la Itala en kantono Tesino kaj la romanĉa (1) en la valoj kaj kelkaj montregionoj de Grizono kantono. Ĉirkaŭ 2/5 da geloĝantoj apartenas al Protestantismo, preskaŭ 2/5 al Katolicismo kaj la ceteraj, esceptinte la malmultajn israelidojn, estas senreligiaj.

En Svisujo vivadas grandega nombro da alinacianoj. En kelkaj urboj la proporcio de Svisoj al la Nesvisoj estas vere malfavora por la unuaj. Ekzemple estas en la urbo Zürich (162.000 geloĝantoj) ĉiu tria homo Nesviso; en la Kantono Zürich (585.000 geloĝantoj) ĉiu sesa homo estas Nesviso. Tiu ĉi cirkonstanco kompreneble havas grandan influon sur nia publika vivo, sed precipe sentas la influon nia laboristaro.

La observanto renkontas en Svisujo faktojn, instituciojn, kiujn oni ne konas aliloke, kaj pro tio, la Svisa laborista movado de kelkaj kamaradoj ne kompreniĝas, aŭ almenaŭ, ne tute kompreniĝas. La Svisaj gelaboristoj estas, bedaŭrinde nur malgrandparte organizitaj: De proksimume 450.000 metiaj gelaboristoj estas nur ĉirkaŭ 80.000 en la organizacioj, t. e. ĉirkaŭ 18, 2 pro cento.

Rigardu ni la ĉefajn Svisajn organizaciojn.

#### 1<sup>o</sup>. La Svisa Grütliverein.

« Grütli » (elparolu: Grütli; esperante: Grütli) estas la Svisa idiomo por la plataĵo: « Rütli », Kuŝanta apud la Kvarkantona lago; tie, la 1-an de Aŭgusto 1102 okazis la mondkonata « juro sur la Rütli ». (Legu: « Wilhelm Tell », de Fr. Schiller). Kiel la nomo, tiel ankaŭ la « Grütliverein » estas pura Svisa asocio. En ĝi nur akceptiĝas Svisoj. Iam, la asocio persekutis la « demokratanojn » politikon; en la jaro 1902 ĝi transiris al la socialdemokrata politiko. Ĉefe kaj konstante la asocio okupas sin pri nacia, Svisa politiko. Ĉiu ajn, kiu estas elektita de la socialdemokratuloj, ĉu kiel urba kantona aŭ nacia konsilanto devas aliĝi al: « Grütliverein ». En la lastaj jaroj la nombroj de « Grütli » anoj malgrandiĝis; la burĝaro diras, ĉar la asocio akceptis la socialistan programon, la membroj de l' Grütliverein diras:

(1) Romanĉa estas idiomo, deveninta el la malnova latina lingvo; ĝi dividiĝas en la Ober-Engadina, Unter-Engadina, kaj la latina romanĉaj lingvoj. Ĝi estas parolata de nun ĉirkaŭ 38.000 homoj. La gazeto: « Fogl' d'Engiadina » (Engadinaj folioj) aperas en tiu ĉi lingvo.

(1) Vendredo de la sankta semajno.

ĉar la Svisoj sin pli okupas pri internacia politiko, do, fariĝas pli kaj pli indiferenta por naciaj aferoj ol antaŭe jam. La « Grütliverein » posedas apartajn sekciojn por la flegado de kantoj, gimnastiko, pafado; ĝi havas kasojn por malsanuloj kaj la posteuloj de ĝiaj mortintaj anoj. Ĝi posedas proprajn, kooperativajn presejojn kaj librovendejojn en Zürich kaj propran, ĉiutage aperantan gazeton: *Der Grütliener* (la Grütli ano). La asocio konsistas el 282 sekcioj kun kune 8,600 anoj. Sidejo de l' komitato estas la urbo Biel (france: Bienne) en la kanton Bern.

### 2<sup>o</sup>. La Svislanda Socialdemokrata Partio (1).

Ĝi konsistas el « Grütliverein », la kantonaj socialdemokrataj partioj, kaj kelkaj pligrandaj socialistaj federacioj de Feksterlandanoj kaj solaj memstaraj socialistaj unuigoj. Po 500 membroj estas elektbla unu reprezentanto (Ligoj kiuj ankoraŭ ne posedas 500 anojn povas al S. S. P. aliĝi, sed ne elekti propran delegiton: ili povas komisi alian, de alia societo, delegitan kamaradon). La S. S. P. enkalkulas ĉirkaŭ 40.000 geanojn.

La kongreso okazas ĉiun duan jaron. Oficiala gazeto estas: *Der Grütliener*. Nuna prezidanto: G. Reimann, partisekretario: Moriz Fahndrich. Ambaŭ estas en Biel. La ĉeflaboron do devas la kantonaj S. P. oĝ fari. Sed ne en ĉiuj kantonoj ekzistas tiaj. Socialdemokratajn Partiojn posedas sekvantaj kantonoj: Zürich, Bern, Luzern, Saint-Gallen, Genève, Vaud, Neuchâtel, kaj la duonkantonon Basell-urbo. Kantonaj « laboristaj Partioj » akceptintaj la programon de S. S. P. troviĝas en la kantonoj: Thurgovie, Aargovie Schaffhausen, kaj en la duonkantonon: Appenzell ekstera? Krom tio, la urboj, lokoj havantaj grandan laboristaron posedas por siaj lokaj propran S. D. P<sup>on</sup>, kiuj nature, se eble, aliĝas al la kantona partio.

### 3<sup>o</sup>. La Svisa Laboristara Konfederacio.

Fondita la 10<sup>an</sup> de aprilo 1887; ĝi konsistas el centraorganizaciaj, solaj ligoj, kaso por malsanuloj k. t. p. kaj celas: « gardadi kaj defendi la rajtojn de la laboranta popolo » en Svisujo. Ĝi havas ĉirkaŭ 120 sekciojn kun kune 280.000 geanoj. La organoj de l' konfederacio estas: *Unue*; la « Laborista tago », kunveno de l' delegitoj de sekcioj; po 250 membroj unu delegito. La « laborista tago » okazas ĉiutrigare kaj elektas la estraron kaj la Svislandan por laboristan sekretarion. *Due*, La « Konfederacia estraro » konsistanta el 50 personoj; 2/3 da ili devas esti laboristoj. La estraro kunvenas ĉiujare, ekzamenas kalkulojn kaj raportojn

(1) La tiuĉara kongreso de la Svisa Socialdemokrata Partio (partitago) okazis la 23-an kaj 24-an de marto en St-Gallen. La traktadoj estos: 1<sup>o</sup> Diskuto de Foficisto kongresaj; 2<sup>o</sup> Fiksigo de l' regularo; 3<sup>o</sup> Akcepto de l' raportoj de l' administrintoj por la jaroj 1905-a kaj 1906-a; 4<sup>o</sup> La financo de l' partio; 5<sup>o</sup> La internacia oficejo socialista kaj kongreso de l' socialistaro en Stuttgart (1907); 6<sup>o</sup> Arbitraciaj juĝejoj kaj senajaj oficejoj (raportante registara konsilanto Heinrich Scherrer, St-Gallen); 7<sup>o</sup> La militaroorganizacio (nova svisa); 8<sup>o</sup> Kiajn taskojn surmetas sur nin la nuna reaktio kaj disigo de l' burĝa partio? (Raportante svisa laboristsekretario H. Greulich-Zürich); 9<sup>o</sup> Proponoj de l' Administracia de l' centra Komitato de l' « Grütliverein », de l' federacioj kaj solaj ligoj; 10<sup>o</sup> Diversaĵoj.

La 23<sup>an</sup> de marto, je la 10<sup>a</sup> matene okazas kunveno de l' reprezentantoj socialistaj en la komunumoj, ĉe kia okazo Kdo pastro Pflüger-Zürich raportas pri esenco, signifo kaj celo de socialista laboro en la komunumoj.

de l' Svisa prolaborista sekretario kaj de l' « direktanta estrareto », fiksas la laboron de sekretario kaj elektas la lastan.

*Trie*; la « direktanta estrareto », konsistanta el 3 membroj de l' konfederacia estraro. Ĝi fiksas la traktadojn por la « laborista tago », administradas la monon kaj dokumentojn de l' konfederacio kaj estas pri la Svislanda prolaborista sekretario. La sidejo de tiu ĉi estrareto nune estas Zürich. Prezidanto estas la sociademokratulo Otto Lang; Svisl, sekretario la socialisto Hermann Greulich. *Kvare*; la « Svisa prolaborista sekretario ». Ĝi okupas sin pri enketoj pri la la stato de Svisaj gelaboristoj kaj pri sociaj studoj. La sekretario ricevas de la Svisa ŝtata unuigo 5.000 frankojn po jaro. 5 kamaradoj laboradas konstante en la sekretario, kiu troviĝas en: Zürich V. Klosbach, zur Rømerburg. Oficialan organon (gazeton) kompreneble ne havas la konfederacio.

4<sup>o</sup>. En la kanton Zürich estis fondata en la lasta jaro la Kristana-sociala Partio. Oni tiam kredigis al ni, ke jam pli ol 3.000 personoj estus aliĝintaj; sed, ĝis nun almenaŭ, oni ne vidis, nek aŭdis plu ion pri ĝi. Ĝia organo estas la gazeto: « Neue Zürcher Nachrichten » (Novaj Zürich'aj sciigoj). Ĝia redaktoro, fondinto kaj prezidanto de l' K. S. P. saltedadas konstante inter demokratismo, socialismo kaj papeco tien kaj reen, amuzante la aliajn partianojn.

### 5<sup>o</sup>. La Komuna Konfederacio de Svisaj Sindikatoj.

Ĝi konsistas el 32 centrafederacioj de sammetiaj sindikatoj, kiuj havas 500 sekciojn kaj, kune 45,500 gemembrojn. La plej grandaj el la aliĝintaj federacioj estas tiuj de la metallaboristoj (11,187 membroj), lignolaboristoj (krom la ĉarpentistoj, 6,054 membroj), kaj horlogistoj (3,420). Sidejo de l' komitato estas Bern. Sekretarioj: A. Calame, F. Thies kaj S<sup>mo</sup> Faas. Propra gazeto: « Die Arbeitersstimme » (la laborista voĉo). « Ne apartenas al la Konfederacio » pluaj 12 federacioj kun kune 382 sekcioj kaj 30,377 gemembroj. La konfederacio de Svisaj sindikatoj agadas laŭ la socialista programo.

### 6<sup>o</sup>. La Katolika laboristara Ligo.


Tiu ĉi organizacio estas tute en la manoj de la katolika pastraro; ne eĉ unu grupo estas, kie ne estas almenaŭ unu pastro la ĉefo aŭ en la Komitato. Estas ankoraŭ al mi neeble, doni ĝustan portreton de tiu ĉi « laborista agado », ĉar la « Ligo » estas nur 3 jara. En aparta artikolo mi parolos pri ĝi. Laŭ la diroj de la ligestro, kalkulas la ligo jam 40,000 gemembrojn. Ĝi eldonas: « Der Arbeiter » (la laboristo), « Die Arbeiterin » (la laboristino) kaj « Gewerkschaft » (la sindikato).

Fine ekzistas en Svisujo kelkajn malgrandajn organizaciojn sub la nomoj: Protestanta sociala laborista societo. Sed ili estas kaj kredeble restos tute malgravaj. Plie ankaŭ ili estas direktataj de pastroj.

### 7<sup>o</sup>. La Svisa kontraŭmilitarista Ligo.

Ĝe kalkulas nune ĉirkaŭ 500 geanojn; la ligo fondiĝis aŭtaŭ 2 jaroj en Lucerno. Ĝia ĉefulo estas la Zuricha

# MILITARISMO



L. Rodo

Vi jam prenis mian viron,  
sed tiun ĉi vi neniam havos!

varaciato kaj oratoro Dro. Brubpacher. Ĝi havas propran organon, nomitan : « Der Vorposten » (la gvardanto, antaŭ gvardanto) kiu aperadas ĉiuononate en Zurich. Ankaŭ ĝi eldonas libretojn, inter kiuj la plej konata estas : « La Kontrando de l' Kapitalismo ». Mi parolos pri ĝi plidetale aliafoje.

9. La Anarĥiista movado.

La Anarĥistoj bedaŭrinde ĉiam malkonsentis sin unuigi. Ĉirkaŭ 2,000 da ili estas en Svisujo. Anarĥistaj gazetoj estas : « Risveglio » (en itala lingvo), « Reveille » (en franca lingvo), kaj « Der Weckruf » (vekiga voko) (en germana lingvo). La lasta nun estas subpremita : ĝi ne aperas plu. Sed, almenaŭ kiel ŝajnas, la anarĥistoj gajnas pli kaj pli teron. Ankaŭ pri « Anarĥismo en Svisujo », mi publikos en I. S. R. plidetalan artikolon.

10. La Socialista gazetaro de Svisujo estas tre riĉa. Ĝi gazetoj, parte politikaj kaj sindikataj, parte tute politikaj aperadas en nia lando. La plej gravaj kaj plej disvastigitaj estas : « Der Grüthliener », « Das Volksrecht » (popolrajto) en Zurich ; « Die Arbeiterzeitung » (prolaborista gazeto) en Winterthur, kaj la « Vorwärts » (Antaŭen) en Basel.

10°. Svisaj Fabrikinspektoroj.

La Svisa Konfederacio (Svisa Ŝtato) dividis Svisujon en tri « Kreise » (rondoj), pri kiuj ĝi komisiis apartajn de ŝtato salajritajn oficistojn. Ili devas esplori la higienajn organizojn, la devenon de diversaj metiaj malsanoj ktp. Inspektoroj estas : S<sup>ro</sup> Dro Wegmann en Mollis (Glaris), Campiche en Lauzanne kaj Räuschenbach en Schaffhäuŝen. La kantono Zürich posedas propran « oficon por fabrikoj ». Ĝia sekretario estas S<sup>ro</sup> Gross, en Zurich.

11°. Lokaj prolaboristaj sekretarioj.

Ili estas ĉie elektitaj kaj ankaŭ preskaŭ ĉie salajritaj de « lokaj laboristaj unuigoj ». Ĝis nun estas en sekvantaj lokaj, sekretarioj : Basel k<sup>do</sup> Grimm ; Bern k<sup>do</sup> Zingg ; Schaffhäuŝen k<sup>do</sup> Meyer ; St-Gallen k<sup>do</sup> Böschenstein ; Lugano k<sup>do</sup> Gobbi ; Winterthur k<sup>do</sup> Kaufmann ; Luzern k<sup>do</sup> Koch. Zuricha pialta kantondouono : Leuthold en Uster ; Zurich : Kamaradoj : Rieder, Kissling, Herrmann.

12°. Plie estas Svislando la side o de l'Internacia Laborofico.

Eble miaj kamaradoj tre miras, ke ili ankoraŭ nenion scias, nenion aŭdis pri ĝi. Ili silentuĝu ! Ankaŭ ni Svisoj scias, vidis nenion de la laboro, farita de l' nomita ofico. Pro tio mi nur konigas al vi la nomojn de l' prezidanto kaj direktoro de l'ofico. Unua estas S<sup>ro</sup> registara konsilanto H. Scherrer-St-Gallen, dua S<sup>ro</sup> Prof<sup>o</sup> Dro Bauer-Basel.

GUSTAV SCHWENGLER.

“ “ “

La Socialista Partio de Granda Britujo.

La « S. P. G. B. » kiel oni kutime nomas tiun ĉi partion, estis starigata en Junio, 1904 a. La plimulto

de la fondintoj estis membroj de la Social-Demokrata-Federacio kaj forlasis tiun ĉi organizon, ĉar ili ne plu konsentis ĝian publikan agadon.

La « S. P. G. B. » speciale tenas ke Socialista Partio neniam devus unuigi kun iaj ajn aliaj partioj, ĉu pretendante, esti pro-laboristoj ĉu konfesante esti pro-kapitalistoj. Ĉiam, ili kontraŭstaradas ĉiujn kandidatojn kiuj ne estas membroj de la « S. P. G. B. ». Ĉar aliaj personoj kaj organizoj, tamen nomante sin men « Socialistoj », kutime subtenas kapitalistajn kandidatojn, kaj konsiladas la laborist-klason ke ili donu voĉon al tiaj kapitalistaj kandidatoj, la « S. P. G. B. » forte kontraŭstaradas ilin, kaj nomas ilin « malami-koj de la laborist-klaso ».

La oficiala organo de la « S. P. G. B. » estas « La Socialista Standardo », kiu aperis monate de septembro 1904 a.

En Decembro, 1905 a, la S. P. G. B. metis antaŭ la komitaton de la Internacia Socialista Kongreso proponojn kiujn ili deziris estu diskutataj publike de ĉiuj delegotoj ĉe la plej proksima kongreso. Ili proponis, inter aliaj, ke la komitato tuj konsideru ĉu estas oportune ke oni alprenu unu lingvon sole, per kiu oni kondukos la tutajn aferojn de la oficejo kaj ankaŭ de la Kongreso. La « S. P. G. B. » petis la tujan pripenson de ilia propono, por ke la komitato alprenu decidon sufiĉe rapide por ke la alprenota lingvo estu uzata, kiel la oficiala lingvo ĉe la Stutgarta Kongreso.

Bedaŭrinde, tamen, la komitato ne diskutis la aferon. Sed, eble, se sufiĉe da kamaradoj kaj organizoj tra la tuta mondo ankaŭ farus la saman demandon, la kamaradoj kiuj estas elektitaj kiel la komitatanoj de la Internacia Kongreso konsiderus la aferon, dum estas oportune. Ĝoje mi ricevus informon de kamaradoj pri tiu ĉi demando.

JOHN KENT,

5, Rutland Road, Ilford, Essex (Anglujo).



**Manifesto de la Instruistoj Sindikatanoj <sup>(1)</sup>**

(APERIS LA 26<sup>oo</sup> DE NOVEMBRO 1905)

“ “ “

Ĉar estas fondita, ke nenia lega teksto ne potence malhelpas al la instruistoj la rajton formi sindikatojn ;

Ke, aliparte, ne estas ĝuste certigi, ke estas juĝa kutimo kontraŭ la sindikatoj instruistoj ;

(1) Tiu manifesto estas la komenco de serio da artikoloj pri sindikata temo movado ĉe la Francaj instruistoj.

Tial, fondiĝis, tuj post la publikigo de la leĝo de 1884 (1), sindikato de Instruadmembroj, kaj pli nove, multaj sindikatoj instruistaj, ne ekcitante la aŭtoritaton juĝan, kaj la persekutado kontraŭ la asocioj sindikataj instruistaj komenciĝis nur pro ordono de la Registaro ;

Tamen, tial, ke se la leĝo nek la jura kutimo ne malpermesas al Asocioj instruistaj la formon sindikatan, ili ne potence ĝin donas ankaŭ ;

Kaj ke apartenas sekve al Povo Leĝofaranta decidi pri tio ;

Ĉar projekto leĝa tion celante atendas esti diskutata ĉe la Parlamento kaj, ke ĝi estas diskutota baldaŭ ;

La Instruistoj Sindikatoj pensas, ke por instrui la popolan opinion kaj la Povon leĝofarantan pri tio, kion ili volas serĉante la formon sindikatan, estas necese, ke ili faru la sekvantan deklaron :

« Se oni akceptas, ke estas en la naturo de la profito supera de la Ŝtato ke la povo sindikata estu malpermesata al oficistoj tenantaj parton de la potenco publika, oni ne povus tion uzi por malhelpi, ke l'instruistoj formu sindikatojn. Nia instruado ne estas aŭtoritata instruado. Ne estas je la nomo de la Registaro eĉ Respublika, nek je la nomo de la Ŝtato, nek ankaŭ je la nomo de la Popolo Franca, ke l'Instruisto instruas : estas je la nomo de la Vero. La rilatoj matematikaj, la reguloj gramatikaj nek ankaŭ la faktoj sciencaj, historiaj moralaj, kiuj ĝin formas, ne povus esti submetitaj je la ŝanĝoj de plimulto politika.

« Venas de tiuj principoj, ke la Instruistaro bezonas sian plenan aŭtonomion kaj la Instruistoj mem la plej grandan sendependecon. Nu, tiu aŭtonomio de la Instruistaro kaj tiu sendependeco de ĝiaj membroj povas esti plene realigataj nur per formigo de sindikatoj.

« La Instruistoj sindikatanoj pensas, aliparte, ke ili restas en la vojo de la movado respublika postulante por siaj grupoj korporaciaj la formon sindikatan kiel estante la sola, kiu decas je l'organizado demokrata de l'Instruado elementa, kiun ili volegas plenumi.

« La Instruistoj efektive decidas, ke ili anstataŭu la aŭtoritaton administracian, kiu konfesas sian nepovon kontraŭ la enmiksiĝoj politikaj, kiujn ili ĝis nun devis uzi por korekti la maljustaĵojn administraciaj, per la forto sindikata.

« La Instruistoj postulas la povon sindikatan plenan kaj tutan. Tamen estas tutmaljuste certigi, ke ilia priokupo estas almiti la rajton striki. Estas, ili insiste tion diras, en penso de organizado respublika, ke ili petas, ke la Povo leĝofaranta al ili donu la povon sindikatan.

« Estas fine pro motivoj moralaj en la ordo plej alta, ke l'Instruistaro postulas la rajton formi sindikatojn : ili volas in en la Kunsfederacion ĝeneralan de la Laboro.

« Pro siaj devenoj, pro la simpleco de sia vivado, la instruistoj apartenas al la popolamaso. Ili al ĝi ankaŭ apartenas tial, ke la filojn de la popolamaso, ili devas instrui.

« Ni instruas la infanojn de la popolamaso dumtage. Kio estas pli nature ol ni pensu retrovigi kun la homoj de la

popolamaso dumvespere ? Estas inter la sindikatoj manlaboristaj ke ni havos konon de la bezonoj inteligentaj kaj moralaj de la popolamaso. Estas per ilia kontakto kaj kunlaborado ke ni fondos niajn programojn kaj metodojn de instruado.

« Ni volas eniri la Borsojn de la Laboro por preni el tie belegajn lecionojn pri virtoj korporaciaj, kaj tie doni ekzemplon de konscienco profesia nia.

« Ni havas la plej altan elpenson pri la formo sindikata. La sindikato al ni aperas ne nur por defendi la utilojn senperajn de siaj membroj, sed al ni saĝnas, ke ĝi devas tiome zorgi por igi pli profita al la homa kolekto la oficon socialan kiun ĝiaj membroj plenumas.

« La sindikatoj devas sin prepari formi la kadrojn de la venontaj organizoj aŭtonomiaj, al kiuj la Ŝtato donos la zorgon funkciadigi sub sia kontrolo kaj sub ilia reciproka kontrolo la publikajn oficojn progrese sociigitajn.

« Tia estas la elpenso sindikata, kiun ni volas enporti en la Borsojn de la Laboro. Kaj tiaj estas la motivoj, en la ordo teoria kaj praktika, pro kiuj ni postulas de la Povo Leĝofaranta, ke ĝi akceptu por la asocioj profesiaj instruistaj la povon sindikatan.

« Tion atendante, ni invitas ĉiujn instruistojn sindikatajn aliĝi al la sindikatoj jam ekzistantaj. »

Subskribis je sia nomo propra :

Sekvas plenpaĝo da nomoj de gravaj instruistoj en la tuta Francujo.

Tradukis Eugène DUFOUR, instruisto.



## POR CAMBRIDGE

“ “ “

La « Internacia asocio Paco Libereco » kaj « Internacia Socia Revuo » dezirus havi rilatojn kun kamarado en « Cambridge » kiu bonvolus sin okupi pri la organizado de la Dua Ĝenerala Kunveno de la « Ruĝuloj » Esperantistoj dum la estonta (3<sup>a</sup>) universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en tiu ĉi urbo.

Skribi al la Sekretario, R. Louis, 45, rue de Saintonge, Paris (3<sup>e</sup>), Franclando.



## Socia Movado

” ” ”

El Belglando.

Ĉe la nuna tempo, la belga laboristaro estas preskaŭ kvietita. La kutima vivado sufiĉas al ĝia malgranda batalemo; kaj ĉar ni ne estas en tempo de voĉdonado, l'ago de la diversaj partioj efektiviĝas sen granda entuziasmo.

La liberecanoj, ja, sin kulpigas se ili malpacigus tiun kvieton : ilia movado estas kvazaŭ paca. Socia teatraĵo ludata, en urboj kaj vilaĝoj, de la komunistaj

kolonianoj de Boitsfort (antaŭe de Stockel), la pulsado de kelkaj malgrandetaj folioj france kaj flandre eldonitaj, kaj fine, la bruiga movado kiu permesigas la Liberecana Komunista Gruparo, jen estas ĉio, aŭ preskaŭ. Estas malmulte!

Pli malfrue, mi donos al vi klarigojn pri la G. C. L. — kiel ni nomas la Liberecanan Komunistan Gruparon — Sciigu, nur, ke ĝi estas anarkista organizajo kiu grupas la liberecanojn en la ĉefaj lokoj de la valona parto de Belglando. Tiu organizajo ĵus faris ĝeneralan kunvenon aŭ kongreson en Lieĝo la 13<sup>an</sup> de Januaro. La demandoj kiuj estis diskutotaj, estas precipe de naturo interna. Ni nur rimarku ke oni decidis energie labori por la plifortigo de la diversaj organismoj: biblioteko, librovendado, interhelpado, k. c., kiuj konstituas la fundamenton de l'nuna vivado de la G. C. L. — Ni diru ankaŭ ke tiu Gruparo laboras intense por la sukceso de l'internacia liberecana Kongreso kiu okazos en Amsterdam en la monato Aŭgusto 1907.

Georges THONAR.

### El Norveglando.

8 junaj socialistoj estas denunciataj pro antimilitarista propagando.

E. H-n.

### El Britlando.

Britaj Statistikoj. — Oni kalkulas ke la riĉeco de Britujo kun Irlando estas 215,320,000,000 frankoj. El tio ĉi sumo: 199,350,000,000 frankoj estas posedataj de 882,690 personoj kun iliaj familioj (eble sume 4,400,000 personoj, kaj 15,970,000,000 frankoj estas posedataj de la aliaj, t. e. de 38,600,000 personoj.

El tio ĉi ni vidas, ke unu naŭono de la loĝantaro posedas dekdu dekrilionojn de la nacia riĉeco.

— La tuta terspaco en Anglujo kun Kimrujo estas 14,000,000 hektaroj. El tio ĉi 7,500,000 hektaroj estas posedataj de 4.217 personoj; t. e. malpli ol unu milono de la loĝantaro posedas pli ol unu duono de la tero.

— La tuta ĉiujara enspezo de la Brita nacio estas proksimume 45,000,000,000 frankoj. El tio ĉi, oni kalkulas, 7,200,000,000 frankoj estas donataj kiel rento al posedantoj de tero, domoj, minoj, k. t. p. 9,000,000,000 frankoj estas donataj kiel procento al kapitalistoj; kaj 11,500,000,000 frankoj estas grandaj salajroj kaj profitoj pour la riĉuloj. La laboristoj, kiuj produktas ĉion, ricevas la reston — 17,300,000,000 frankojn — iom pli ol unu triono de la tuto.

W. W. PADFIELD.

(laŭ « The Socialist Annual »).

### El Danlando.

Stranga proceso kontraŭ antimilitaristoj. — La junaj socialistoj en Danujo elsendis ĉe la paska tempo en la antaŭa jaro antimilitaristan alvokon. Pro tiu

alvoko la aŭtoritatoj denunciis 20<sup>an</sup> da ili. Kvar el ili oni poste liberigis. La 22<sup>an</sup> de decembro lasta falis la kondamno je la aliaj dekkvin. Ĉar oni ne povis kondamni laŭ ia paragrafo en la civila leĝo, oni kondamnis laŭ « punleĝo por milita potenco », tio estas: laŭ leĝo por deĵorantaj militistoj. Tre strange kaj ridinde, kiam oni pripensas, ke inter la denunciitoj estas — *du virinoj!*

Tamen la juĝistaro en la lasta momento prokrastis la kondamnojn je unu monato. Mi tiam sciigos la finan rezultaton.

E. H-n.

### El Finlando.

Ligon de junaj social-demokrataj de Finlando oni fondis en la fino de la antaŭa jaro en Tammerfors. Ĝi eldonos literaturon, proprajn gazetojn k. t. p. En la antimilitarista demando la kongreso decidis:

1<sup>o</sup> La ligo de junaj socialdemokratoj de Finlando klarigas sian rilaton al la militarismo per alpreno de la antimilitarista batalado je ĉiuj ĝiaj formoj.

2<sup>o</sup> Se la registaro intencas refondi ĝeneralan militan ekzercdevon, opinias la ligo de junaj socialdemokratoj de Finlando, ke estas ĝia devo renkonti tian faron per ĝenerala rifuzo fari militistdevon.

E. H-n.

### El Franclando.

Senutilaj persekutoj. — Post la Borso de la laboro de Paris, post tiuj de multaj urboj, la Borso de l'laboro de Limoges ĵus estis forpelita el la urba loko.

La Limoĝa urbestro volis trudi regularon — kiel en Paris — al la sindikatoj, sed tiuj ĉi sindikatoj rifuzis se submetiĝas.

La Limoĝa registaro kredis detruji la sindikatan fortecon en Limoges, eraro! La ruĝaj sindikatoj lasis la urban lokon, kaj luis lokon en kiu okazis iliajn kunvenojn.

La sindikatanoj pagas, de januaro, aldona kotuzajo, por la funkciado de la Borso.

Estas necese, ke Clemenceau kaj sia bando scias, ke la laborantoj volas liberiĝi, kaj ne estas per maispritaj persekutoj, ke oni haltigos la proletaria movado.

Kontraŭe, ĵu pli la proletarioj estas persekutitaj des pli ili devenas revoluciaj.

Atentu Clemenceau! atentu registaroj!

— La ĝenerala komitato de la Borso decidis interkonsenti, kun la socialista Partio, pri la kreo de « Domo de la Popolo ». Komitato, kiu konsistas el ses delegitoj de sindikatoj, kaj ses deligitoj de socialista Partio estis preninta sur sin, de ricevi la necesan monon, por la konstruo de tiu ĉi Domo de la Popolo, kaj okupiĝi pri la necesa propagando.

LÉON BERLAND.

∴

Aliaj ministraj, samaj agoj — De kelkaj jaroj (de la afero Dreyfus), preskaŭ ĉiu franca ministraro enhavas unu socialistan ministron, — aŭ eĉ multajn. Ni unue havis

Millerand, kiel komercan ministron, poste Briand, kiel religian ministron, fine Viviani, kiel laboran ministron. Kiam tiuj socialistoj alvenas al la registaro, kion ili faras? Tion, kion la burĝaj ministroj faras. Ili uzas la burĝajn leĝojn, defendas la burĝan ordon. Ekzemple: antaŭ ol esti ministro, « kamarado » Briand laŭdegis la ĝeneralan strikon en siaj paroladoj; nun, konsente kun siaj kolegoj, li sendas la armeon kontraŭ strikantoj. Ĉu ili povus alie agi? Ne, ĉar ili devas respekti la opinion de iliaj kolegoj. Eĉ se la tuta ministraro estus socialista, ĝi ne povus agi sen la konsento de l'parlamento. Kaj se la parlamenta plimuto ankaŭ estus socialista, ĝi nenion povus fari sen la aprobo de l'nacio.

La nuna prezidanto de l'ministra konsilantaro estas Sro Clemenceau. Li estas tre inteligentahomo, tre bona verkisto. Liaj jurnalaj artikoloj faras pri la nuna socio kritikon tiel senkompatan, kiel tiu farita de socialistaj kaj anarhianaj venkistoj. Eĉ Sro Clemenceau eble alproksimigas pli je anarhianoj (en siaj artikoloj kaj libroj) per sia granda amo de l'libereco kaj sia malfido kontraŭ Ŝtato. Nu! de kiam li posedas la povon, li agas kontraŭ laboristaj tute same kiel ĉiuj ministroj: li kulpigas ilin, ke ili konspiras kun monarĥejoj por malstarigi la Re-pub'ikon; li sendas la armeon, kiam ili estas strikantaj; li arestigas iliajn riprezentantojn, la anojn de l'Labora konfederacio; li ekkaptigas iliajn gazetojn « La Voĉo de l'Popolo » antaŭ ol tiuj ĉi estu aperintaj, kio estas kontraŭa al leĝoj; li malpermesas iliajn publikajn elmentojn, eĉ kiam tiuj ĉi havas kiel celon la respekton de la leĝo.

Dum la lasta jaro, la parlamento decidis leĝon, kiu devigas mastrojn doni al laboristoj kaj oficistoj unu tagon semajne, la dimanĉon, por ripozo. Tre malmulte da mastroj obeis la leĝon. Tial, ĉiudimanĉe, laboristoj kaj oficistoj promenadas sur la stratoj, kaj, kriante « Vivu la leĝo! » devigas mastrojn fermi metiejojn aŭ magazenojn. Estas tre bone krei « Vivu la leĝo! » vi opinias? Nu, la policistoj de Sro Clemenceau frapadas, ne sur mastroj malrespektantaj leĝojn, sed sur popolo volanta ke leĝoj estu respektataj! Antaŭ kelke da tempo, la sindikatoj estis organizintaj grandan elmontran favorontan la « ĉuisemajan ripozon ». Ili intencis multegope trairi Parizon, forirante de la Labora Borso kaj trapasante la ĉefajn stratojn de la urbo, precipe la « grandajn bulvarojn », kie estas la plej belaj butikoj. Tuj Sro Clemenceau diris, ke la elmontro estis malpermesata, kaj je soldatoj plenigis ĉiujn stratojn ĉirkaŭ la Labora Borso, por ke la sindikatoj ne povu pasi. Okazis bataloj, vunditaj homoj, mortigita virino.

Ne ni miru. Registoj havas kiel ĉefan funkcion la konservadon de la ordo. Ili ne sendas soldatojn kontraŭ mastroj, ĉar ili scias, ke la mastroj ne rabados, ne fajrigos, ne eltenversos. Sed ili sendas bajonetojn, pafilojn, kaj se bezone bombardilojn, kontraŭ popolo, ĉar ili scias, ke popolo volonte ribelas, volonte malrespektas ordon, kiu al aliaj profitas.

René CHAUGHÉ.

### El Hispanlando.

Post la malsukcesinta prezentado en la teatro nomata Parlamento de la tarso titolita « Leĝo pri religiaj asocioj »,

kies rolojn ludis kvar malsamaj liberalaj ministraroj, trapasintaj la naciregejon iom simile laŭ rapideco al turniganta kinematograffilmo, kaj per kia leĝprojekto nur oni celis en efektivo trompi la popolon, dirante ke ĝi taŭgos mirinde por malaperigi privilegiojn de religiularo, la hispana nacio denove vidis, ke farigas ĝia registarestro sinjoro Maŭra, tiu viro konata en la tuta Eŭropo pro la turmentoj, kiujn li kaŭzis al laboristoj ĉe vilaĝo Alcala del Valle, kaj kiu nur estante subulo de la papo, intencas tirane plibonigi Hispanlandon, dissemante ja teruron inter laboristaro.

— Pro labormanko kaj kaŭze je grava subita panplikarigo, gelaboristamaso el Madrid ribelis kaj atakis panejojn kaj disrompis ĝiajn pordojn kaj fenestrojn kripetante: « panon po kvardek centimoj! »

Tiuj sinmontrantoj fortigis kontraŭ polico en la strato sankta Izabelo, kie oni faris iom da pafoj; ĉe strato sankta Anno la anaro reatakis energie la panejojn, sed polico disigis geprotestantojn trafinte pafite iujn el ili; malgraŭ tio grupoj obstinis siu ĵeti denove kontraŭ panejojn, kaj en tiu celo dividigis ili por iri renkonte al policanaro, kiu tiun ĉi fojon deprenis standardojn kun jena surskribajo:

« Ni volas malkare panon! »

Vidante la polico la malfacilecon elvenki perforte l'obstinecon de la viroj, vengigis sur virinoj kaj infanoj, ilin glavbatante furioze, sed spite ĉi tio ĉe policistoj ankaŭ trovigis vunditoj.

— En la revoluciema urbo Valencia ĉiuj oficistoj de urbimpostado strikis, ĉar impostofarmantoj anstataŭis ilin senkonsente per alia nova personaro.

Inter malnovaj oficistoj kaj iliaj anstataŭontoj okazis pro tio kolizioj, el kiuj rezultis unu mortigito kaj kelke da vunditoj, kaj kies malkonsento finiĝis farigante venkintoj la strikistojn, kiuj poste brutigis la impostoficejojn kaj kunigis kun kontrabandistoj por enporti en la urbon ŝarĝitajn ĉarojn da oleo, ŝapo, viando, vino, k. c.

La urbamaso aplaudis la strikistojn, kiuj portante standardojn, are trains la urbon kriante: « For la mangajim-posto » kaj « Vivu la libereco! »

Tiu ĉi lasta krio, kiu tiom ravigas en Hispanujo iajn homojn, ne povas iluziigi tiujn, kiuj pensas ke ĉia regado estas nur tiraneco, nek nin, kiuj kredas ke la malbonstato de la laboristaro ekzistas efektive nur pro ĝia malkuraĝo, nek ankaŭ al ni, kiuj penas konigi al niaj kunfratoj, la laboristoj, ke por defendi siajn rajtojn, ili ne bezonas riprezentantojn en parlamentoj nek ie ajn, ĉar tiuj leĝfabrikantoj nur zorgas nin trompi por konservi la profiteblajn lokojn, kiujn ni donis al ili.

Tion ĉi pravas la fakto, ke dum la enlanda leĝaro promesas libere kunveni por esprimi publike ian ajn opinion, alia speciala leĝo nuligas tion kaj kondamnas plie je kelkejara malliberigo al tiu, kiu kuraĝas eldiri ĉe publika kunveno sian proteston kontraŭ oficialaj maljustaĵoj, kiel ekzemple okazis antaŭ nelonge en Madrid al iu kamarado dirinta ke « al uzantoj de perforto oni devas kontraŭbatali perforte », kaj ke « por kontraŭstari pafiluzon, ekzistas dinamito ».

Ankaŭ ni posedas presliberon — ĉe leĝaro kompreneble — ĉar praktike i laboristaj gazetoj, ĉu socialistaj, ĉu

anarkistaj, precipe tiuj ĉi lastaj, estas facile leĝdenuncataj pro simpla artikoleto, kaj ĝiaj aŭtoroj sekve estas devigataj pasigi pune preskaŭ dekon da jaroj ĉe malliberejo.

Veraj liberĝuantoj estas tie ĉi nur la monaĥoj, ĉar ili estas la solaj kiuj ial laŭdezire skribas kaj parolas kiuj trankvile manĝas kaj kiuj bonvivas senpene, dum laboristoj troviĝas en neceso elmigri el ĉi tiu inkvizicia lando, kie nur ekzistas tri alpreneblaj rimedoj: « formigri », se oni ne volas konsenti; « morti pro malsato », se kontraŭe, aŭ « fariĝi monaĥo » se vivi oni deziras.

Kajetano DEK.

### El Holando.

Du gravaj strikoj. — Jam de kelkaj semajnoj daŭradas du signifplenaj strikoj en nia lando.

La unua okazadas en Deventer. 120 tapiŝistoj ekstriks pro la eksigo de unu el ili. Tapiŝisto, jam de 26 jaroj laborante en la tapiŝfabriko, kaj konita kontraŭalkoholisto, ekkoleris je lia ĉefo, kies ĉiutagaj rimarkoj plaĉis al neniu (la ĉefo iam estis kunlaboristo, do oni povos kompreni la situacion!) kaj kolerege batis tiun-ĉi. Sekve, la majuna laboristo estis forsendata de la direktoro; la direktoro persistis je la forsendo, kvankam la nomita ĉefo paroladis favore por la laboristo forsendita. Kiel oni ekvidas, tie ĉi troviĝas la problemo de l' tago: la laboristoj postulas ke la kamarado estu reakceptata, ili volas ankaŭ esti rekonataj pri la aferoj de l' fabriko kaj la direktoro siavice volas restadi la ĉiopotenculo, kiu neniel kaj neniam toleros ian konkurencon. Tamen estas kredinde ke la grava morala konflikto baldaŭ estos pasinta, ĉar fine la laboristo decidis neniam reeniri en la fabrikon, trovinte aliajn okupojn.

La dua striko okazadas en Rijssen. Pli ol 1000 laboristoj en la jut-fabrikado (juto estas speco de knabano, el kiu oni faradas sakojn, k. c.) estas en striko. La laboristoj gajnante meze nur 6 guldenojn (12 1/2 frankojn) semajne, postulas salajro-pliigadon de... 30 cendoj (62 1/2 centimoj) sed la fabrikanto obstine rifuzas. La strikistoj havas multan simpatian tra tuta Holando; eĉ kelkaj burĝaj kaj kristanaj gazetoj kaj societoj kolektadas mondonacojn. Sed nature kaj kompreneble, la plej granda parto de l'mondonacoj devenas de l' socialistoj kaj progresemaj sindikalistoj. Mi ne ankoraŭ povas antaŭdiri, kio kaj kiel estas la fino de l' striko.

La trouzado de l'alcoholo treege okazadas ĉe tiuj laboristoj, eĉ ĉe virinoj kaj tre junaj infanoj. Tamen, estas kompreneble. La socia mizero kaŭzas la alkoholmizeron almenaŭ plimulte, kaj la juta fabrikado mem estas tre malsana, eĉ kaŭzas je juna aĝo malsanojn kiel ekzemple siro.

Rifuzantoj en la armeo. — De 1897' preskaŭ ĉiu jare oni malkonstatas junulojn, kiuj ne deziras iĝi mortigantoj nek volas servi kiel kanonkarno. Tiumomente ankoraŭ du junuloj (Gorter kaj Mammen) troviĝas en mallibereco pro sia rifuzado. Ĉiufoje la militistaj juĝistoj juĝadas tiajn junulojn, ĝis tiuj ĉi estas tute malfortigintaj, fizike ankaŭ morale. Tiel okazis kun la kamarado Kriller, kiu ĵus rehavis sian liberecon, sed kiu estas tiel malfortiginta, ke li nepre bezonas longan tempon por resaniĝi.

En la Parlamento la ministro de l' militaĵoj sciigis, ke li evitigus necesajn turmentojn! Kaj Holando estas nomita « la antikva lando de l' libereco!! »

J.-L. BRUIN.

### El Pollando.

Lokaŭto en urbo Lodz (Rusa-Pollando). — Ĝis la 29-a de decembro 1906, ĝis nun, daŭras la batalo de laboro kun kapitalo. Ses plej grandegaj fabrikejoj estas fermitaj. Perdis laboron pli ol 30.000 laboristoj, kun familioj superas la nombron 100.000 homojn; unuvorte kvarono de ĝenerala nombro de Lodza loĝantaro estas alĵetita sur la straton, kaj do, reprehita estas al ili la poveco de ekzistado sur tiu ĉi tera globo.

Kio do fariĝis? Ĉu kia katastrofo, fajrego, aŭ tertremo oni detruis la teksilojn de laboro? Ne, ili staras ĉiam pretaj por fabrikigi la produktojn. Ĉu eble por tiuj ĉi produktoj oni ne havas la bezonojn? Kaj tio ĉi ne. La kaŭzo sola kaj sufiĉa por ekhalti la movon de la tuta asocia maŝino de granda urbo, por eljeti milojn da homoj sur la pavimon estas volo de kelkaj unuecoj. Posedantoj de ses la plej grandegaj fabrikejoj rimarkis, ke la nuna momento estas la plej konforma por reakiri ne longe faratajn cendojn kaj plibonigojn, humiligi, subpremi la laboristojn kaj ekdikti al ili novajn kondiĉojn de laboro kaj dungo. Kaj do, lokaŭto de supro estis antaŭvidebla kaj pretigita.

Kian turniĝon alprenos la nuna situacio Lodza; antaŭvidi hodiaŭ estas tre malfacile. La mizero, kaj kun ĝi la malkontento de popolo kreskas kun ĉiu tago. Monhelpe farata de organizacioj laboristaj, ne povas esti sufiĉa. La gazetaro proponas interjuĝon, kiu havus la rajtigojn igi la kontraŭulojn fari reciprokajn cendojn por atingi interkonsenton. Kia ajn estos tamen senpere rezultato de Lodza lokaŭto, en sekvoj siaj ĝi tamen profundigos la abismon, disdividanta du mondojn, kaj entiros en batalon klasan tiujn, kiuj eĉ ĝis nun estis indiferentaj, konscion de klasa antagonismo ekakriĝos en pli granda grado, ol farus kia-ajn agitado.

TOMO.

### El Ruslando.

Tom el statistiko de revolucio rusa. — « Piereom » citas interesantan statistikon pri la nombro de atencoj politikaj, kontraŭ la oficistoj, bienhavantoj, fabrikistoj, bankiroj, kaj pastroj.

De la februaro de 1905 ĝis la decembro de 1906, kiel sciigas « Piereom » — oni mortigis kaj danĝere vundis:

67 general-guberniestrojn kaj urbestrojn; 315 vilagestrojn, komisarojn kaj gradajn policistojn de vilaĝo; 57 poliestrojn kaj subpoliestrojn; 347 policistojn; 47 oficiojn de defendejo kaj de ĝendarmaro; 95 ĝendarmojn; 74 agentojn de defendejo spionojn; 124 oficiojn de armeo; 382 soldatojn de armeo; 215 oficistojn civilajn; 53 pastrojn; 68 reprezentantojn de la estraro vilaĝa; 73 bienhavantojn; 117 fabrikistojn; 72 bankirojn. — Kune: 2.106 personojn.

Dum la pacigado, dismovadoj, ribeloj, armadaj, strikoj, demonstracioj kaj « pogromoj », oni mortigis 32.706 revolucianojn. — Militistaj juĝistaroj mortkondamnis 539 personojn.

Salajro de policistaro en la tuta rusujo — kiel sciigas « Novaja Gazeta » — kun ĉiu jaro pligrandigas. En la jaro 1904 oni elspezis por tiu ĉi celo 27.254.798 rublojn, en la jaro 1905: 27.904.334 rublojn; en la jaro 1906: 30.241.224 rublojn, kaj por la jaro 1907, minist'aro de internaj aferoj ekspozulis por pli supra celo 50.541.244 rublojn.

TOMO.

Agado de nia filio « Espero » estas ĉesegita, ĉar danĉo de l'morto, kiel sanga ventego kaj fajra trombo un portas tra nia malfeliĉa lando. Ĉie estas arestoj, traserĉoj, pafmortigoj. En daŭrigo triajn lastajn monatojn estas ekzekutitaj 490 homojn laŭ decidadoj milit-lampejuĝoj. Oni traserĉas la domojn, traserĉas korveturantojn kaj alveturantojn, malgraŭ iliajn sekson kaj aĝon.

La malliberejoj estas tro plenitoj, oni ne havas lokojn kie kuŝigi malsanulojn kaj tiuj kuŝas inter sanulojn kaj infektas ilin.

La tuta Ruslando estas sub milita situacio kaj plifortigita policigardado. Al batalantoj por la tero kaj libereco nek paroli, nek skribadi, nek kunvenadi estas malpermesita sub minaco de tuja pafmortigo. Jen kun ĉi kondiĉoj ni devas elekti prezentantojn en 3<sup>an</sup> « Gosudarstvennaja Duma » !!

### El Svedlando.

Ekskomuniko en la Sveda Social demokrata Partio (1). — Pro la opozicio, kiun la revoluciaj « junsocialistoj » faras kontraŭ la reformista gvidado de la partio, proponis la partia « generalstabo » *ekskomuniki* komence du el la plej eminentaj anoj de la opozicio. Ili estis: ro Hinke Bergegren, redaktoro de la junsocialista gazeto « Brand », kaj: ro C. G. Schröder, redaktoro de la junsocialista gazeto « Nya Folkviljan ». Ĝis proksima partikongreso tiuj du sinjoroj tamen « nur » devus esti *suspensitaj*, kaj la kongreso definitive decidu pri plena ekskomuniko. La motivo por tiu ekskomuniko estis, ke la opozicio « sisteme » atakas la gvidantojn kaj kaŭzas malunuecon en la partio k. t. p. (kio signifas, ke la reformista aŭtoritato estis en danĝero pro la revoluciista opozicio!)

Tiu propono elvekis grandan sensacion. Kelkaj partianoj aprobis la proponon kaj ĝian motivon. Sed aliaj opiniis, ke tiu propono estis tute malkorekta laŭ la regularo de la partio; ke ekskomuniko estis malhonto por la partio, kiu per tio montrus maltoleremon kontraŭ tiuj, kiuj havas opiniojn iom diferencajn al la oficialaj de la partio; ke opozicio estas necesa kaj utila k. t. p. Oni ankaŭ suspektis, ke la « generalstabo » faris sian proponon en sekreta intenco kaŭzi unuecon en la partio. Ĉar la partianoj estas inklinaj fari generalstrikon en tiu ĉi jaro por akiri la gene-

ralan politikan elektorajton. Sed la « generalstabo » ne volas tion kaj uzus la neunuecon, kiu aperus pro la ekskomuniko, kiel motivon antaŭ la partianoj por ne aranĝi tian strikon.

Pro tio kelkaj laboristkomunumoj (1) rifuzis partopreni en la voĉdonado pri la suspensio, kaj kelkaj sindikatoj klarigis, ke ili elirus el la laboristkomunumoj (kaj tiel el la partio) se nomita propono ĉe voĉdonado sukcesus.

En la sekvanta voĉdonado estis donitaj nur 26.612 voĉoj, kio ne estas eĉ duono de la nombro da voĉoj en la partio. La alia duono estis tute indiferenta je la afero aŭ rifuzis voĉdoni. El donitaj voĉoj estis 18.612 *por* suspensio kaj 8.000 kontraŭ ĝi.

Sekve: roj Bergegren kaj Schröder nun estas suspensitaj ĝis plue. Tiu suspensio tamen plibaldauigos la disiĝon inter la sindikatoj kaj la socialdemokrata partio, kiuj nune estas strange kunmetitaj. Ankaŭ estas certe, ke *nova socialista partio*, pli radikala kaj revolucia, estos fondata pro la okazo de suspensio kaj eks-komuniko.

Einar Håkansson.

Södertelge, 15 januaro 1907.

## KIU DAURIGOS?

“ “ “

La Grupo Liberecana en Paris organizas feston por la profito de « Internacia Socia Revuo ». La grupo de la revoluciaj poetoj kaj la teatra grupo de la « Fraternelle », Popola Universitato donos sian helpon. Tiu ĉi festo okazos la 3<sup>an</sup> de Marto je la 2<sup>a</sup> vespere en la Domo de l' Popolo, 92, rue Clignancourt.

Prezo: 50 cent ĉiu persono.

## ESPERANTA MOVADO

“ “ “

### Esperanto inter la Svedaj laboristoj.

La laborista Esperanta Societo en stockholm faras tri kursojn. Devas esti *sep*, el kiuj tri en sia ĉambro kaj la aliaj en aliaj urbopartoj.

E. H.

” ” ”

### Esperanto en Turklando.

En la turkaj urboj, kaj precipe en la ĉefurbo, la malfrua propagando de l' lingvo internacia Esperanto havas du kaŭzojn laŭ la ideoj formataj, ĉe personoj vivantaj inter la popolanoj.

(1) Laboristkomunumoj estas la lokaj grupoj de la partio, unu por ĉiu urbo aŭ burĝa komunumo.

Oni ĉi havas 15 reprezentantojn en la parlamento.

La unua estas : la progreso de l' komerco, kaj la dua : la limita instinkto.

Pri la unua, la malusta Bizanco forte laboras al la instigado de siaj infanoj. Antaŭ dek jaroj la kono de l' franca lingvo estis larĝe sufiĉa al la indiĝenoj, kaj nun ili sentegas bezonon lerni eksterlandajn lingvojn, ĝenerale la anglan kaj germanan.

La multenombraj anglaj societoj fonditaj en tiu ĉefurbo derigas la urbanojn pliprofundigi kaj posedi serioze sian nacian idiomon.

Estas same pri la germana lingvo. Tio venas de l' konsiderinda influo, kiun la germankomerco estis preninta en Konstantinopolo; sekve ĝia studo rapide disvastiĝis inter la komercistoj kaj studentoj.

Post tio ĉu la supereco de l' lingvistoj ne estas videbla? Anstataŭ krei scienculojn oni vidas naskiĝi, lingvocele, internaciulojn.

La dua punkto malfruigante Esperanton ĉe la Turkoj estas kiel mi diris komencante : la limita instinkto.

La aristokratklaso forte estas partigita en tiu ĉefurbo. Ĝi enhavas la indiĝenan klason la grekan, kaj la eŭropan. La du unuaj laboras egaligi eĉ superi la lastan, kiu konsistas el okcidentanoj; pri tio ili troviĝas en la malfacileco lerni tri aŭ kvar lingvojn ne kalkulante tiujn pli uzitajn, tiel francan, turkan, grekan aŭ armenan.

Feliĉe, ke la orientano posedas eksterordinaran kapablecon lerni ĝin. Estas tre eble, ke tio venas de la rilatoj trovataj en sia naskurbo. Oni povas bonege diri, ke la konstantinopola placo estas internacia, la eksterujanoj estante multnombraj. Ĉu la propagando ne fariĝas rapidege.

Ni do povas konkludi : La konstantinopolano ne bezonas lerni Esperanton, li povas studi tre facile la aliajn. Tio estas la orienta-pensado; dum ni ŝercas sekvi proverbon : Tempo estas mono.

Pri Esperanto ni devas diri, ke ĝi estas nekonata. Tute, la turka ĉefurbo enhavas kvin esperantistojn, eble malpli, kaj senpretende mi povas esti la sola (1).

Malmultaj kluboj ekzistas en Konstantinopolo. Malfacile oni permesas kuniĝi kaj formi societojn.

Sed ni nenion bedaŭras. La progreso vekiga. Ni labarado propagandi Esperanton, ni formu aktivajn kamaradojn, kaj en la tempo venanta ni facile klubojn fondos.

VALERI.

### El letero.

« La popoloj estas por ni fratoj » diras la maljuna kantaĵo de P. Dupont.

Pensi tion estas bone, diri tion estas tre bone. Sed ankoraŭ estas bezone sin komprenigi de aliaj popoloj.

Tial, mi aplaudas el tuta mia koro pri la ideo de kelkaj kamaradaĵ eldoni unuan revuon internacian socian.

En ĝi la ruĝuloj el ĉiuj landoj povos kompreni sin kaj frati.

Se la lingvo Esperanto fariĝos iam lingvo internacia ni estos batalintaj per nia agado al tiu granda afero.

Iam, en Loire, estas multaj grupoj esperantistaj. Ili

mankas pri detaloj, sed mi scias, ke kelkaj kamaradoj interŝanĝis, poŝt-kartojn kun korespondantoj de aliaj nacioj, eĉ de kaŭkazo.

Ni kredas, ke tio progresadigos ideojn de paco, frateco kaj libereco kiuj estas niaj. ROUSSET-GALHAUBAN.

Jus fondiĝis en Ĝenevo la *Internacia Scienca Asocio* kaj la *Internacia Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo-Svislando :

1<sup>o</sup> La aliĝo al la Internacia Scienca Asocio estas *sempaga* kaj postulas nenian monon kotizajon, la Ĝeneva Scienca Oficejo danke ricevas monoferojn (ne malpli ol fr. 2) kaj abonojn al la *Scienca Revuo*, sed tiuj donacoj kaj abonoj, estas nur *laŭvole*;

2<sup>o</sup> La Scienca Asocio konsistas ne nur el sciencistoj, filozofoj, kuracistoj, sed ankaŭ el inĝenieroj, arkitekturistoj, oficiroj, juristoj kaj ĝenerale el la reprezentantoj de ĉiuj industrioj.

## DIVERSAĴOJ

•• Sub tiu rubriko, ni publikigos la sciigojn, kiujn sendos al ni kamaradoj pri la esperantistaj grupoj revoluciaj.

•• La membroj de la Internacia Asocio *Paco-Libereco* estas petataj sendi sian kotizajon por 1907.

•• **Socia grupo de la Esperantistaj Laboristoj** en Lyon'o kunvenas ĉiulundo je la 8<sup>a</sup> 1/2 vespere, 22 bis, rue Saint-Antoine (angulo de la rue Gondolière).

Sendi la korespondadon al la Sekretario.

### Socia informejo en Hegi-Winterthur (Svislando)

Donas ĉiujn informojn pri vivina, laborista, antireligia, socialista, alkoholkontraŭa, anarhistaj movadoj. Personoj kiuj volas esti informitaj pri nunaj okazantaĵoj gravaj de l' socialistoj aŭ anarhistoj devas pruvi, ke ili apartenas al unu el la du partioj: Mi akceptas gekorespondantojn.

G. SCHWENGLER.

### Internacia Asocio Paco Libereco

La dimanĉon 20<sup>an</sup> de Januaro okazis la unua festo organizita de la Centra kaj Pariza Komitatoj de « Paco Libereco ». Pli ol 500 personoj ĉeestis. Tio estis sukceso neesperita ĉar la loko, kie okazis tiu ĉi festo, estis en plena centro de la grandega elmontro por la ĉiusemajna ripozo. Tio malhelpis ke multaj personoj venu. Nia amiko Sr<sup>o</sup> Th. Cart faris tre aplaudaditan paroladon pri Esperanto kaj Demokratio. Oni ludis 3 teatraĵojn : unu en Esperanto : « La Barelo da Ĉambertino » tradukita el la Franca Lingvo de nia amiko F. Blangarin, kaj en Francalingvo « La Cage » (La Kaĝo) teatraĵo revolucia de L. Descaves kaj « L'Heritage Klodarek » pri esperanto de Sr<sup>o</sup> F. de Menil.

Le Gérant : LOUIS.



La Presisto : Presa komunista Societo.  
L'Emancipatrice, 3, rue de Pondichery, Paris.  
F. TIZORIS, adm.-délég.

Laŭ la Esperantista jarlibro 26 esperantistoj ekzistas en multaj landoj, certe ekzistas multaj nekonataj. — R. d. I. R.

— Svedlando: EINAR HÅKANSSON. — Svislando: GUSTAV SCHWENGELER. — Tur-  
 lando: VALERI. — Unuigitaj Ŝtatoj Nord-Amerikaj:  
 BRUCE, COL. E. RANDALL. — Urugvajo: MARCEL VEREMA. —  
 E. WILLETZ.

### Desegnistoj

— KLENE, DELANNOY, VAN DONGEN, GRANDJOUAN,  
 HENRI-POL, JOSSOT, KUPKA, LUCE, LUDOVIC RODO,  
 L. MAITTESTE, RAYMOND CARRIER, RIOUX, ROBIN, VAN  
 ROUWBERG, ROUBILLE, STEINLEN, TORNÉ-ESQUIOUS, VALLO-  
 N, A. WILLETZ,

### Naciaj Administrantoj de « Socia Revuo »

Franclando: Oficejo de *Internacia Socia Revuo*, 45, rue  
 de Saintonge, Paris-3<sup>e</sup>. — Svislando: GUSTAV SCHWEN-  
 GELER, en Hegi-Winterthur. — Aŭstrolando, Hungarlando,  
 Bohemlando: JOSEF TEPLY, Donis-Gröttau (Bohem.). —  
 Bulgarlando: DR<sup>o</sup> DIODONO, en Bolnico *Aleksandrovska*,  
 Sofia (Bulg.). — Britlando: W. W. PADFIELD, en Ipswich,  
 22, Murray Road (Angloloando). — Hispanlando: K. DIEZ,  
 calle de Zugaste nobia litra M piso 1<sup>o</sup> irkuierda, Bilbao  
 (Hispanl.). — Holando: J.-L. BRUIJN, 170, Keppelerstraat  
 S-Gravenhage; Svedlando: EINAR HÅKANSSON, Södertelge.  
 — Urugvajo kaj Argentina respubliko, G. MUINOS, Ara-  
 py 293, Montevideo.

## KALKULOJ

En kaso la 16<sup>an</sup> de Januaro, 224.30; ni ricevis ĝis la 12<sup>an</sup>  
 Februaro: G. Barat, 6.00; M. Carret, 6.00; Studenov, 5.90;  
 Uydert, 5.90; Ch. Reboisson, 6.00; Fougère, 6.00; Baron,  
 3; Berland, 6; Percy G. Sammons, 6.30; Duthil, 1;  
 E. Chazot, 2.50; V. del Plato, 1.00; J. Cattaneo, 2.50;  
 J. Vergava, 1; J. Rossini, 1.00; C. Ambrosetti, 1.00; J.  
 Cassolino, 1.50; M. D. Savoyat, 1; L. Rodriguez, 1; G.  
 Muinos, 7.50; Vallberg, 11.90; Billiard, 1.00; D<sup>no</sup> Dieter-  
 len, 7.00; Bastide, 9.40; Papillon, 15.00; Esp. Liberecana  
 Grupo en Paris, 15; Delahaye, 6; Schwengeler, 6.90; Iva-  
 nof, 19.00; Zinoviev, 5; F. Watters, 5.50; Padfield, 13.00;  
 Gaillard, 1.75; Chauvet, 6.00; Charron, 1.50; Walter, 1.50;  
 K. Dek, 7; Nys, 1; Grindley, 6.00; Llewellyn, 6.00; Mit-  
 chell, 6.00; Boček, 6.00; Teply, 1.80; Ardouin, 10.00;  
 Olsson, 6.00; vendo de la 4<sup>a</sup> folio, 1.10; vendo de la 1<sup>o</sup> nu-  
 mero, 16.80; F<sup>no</sup> C. E. Andrews, 5.50; E. Whitley, 6.00;  
 Rouge, 1.80; kune 502.85.

*Elspezoj*: sendo de la 1<sup>o</sup> numero, korespondo kaj diver-  
 sa, 26.05; preso de la 2<sup>o</sup> n<sup>o</sup> 232; kune 258.05.

Enspezoj. . . . . 502 fr. 85

Elspezoj. . . . . 258 fr. 05

En kaso. . . . . 244 fr. 80

Ni ne ankoraŭ ricevis la postajn mandatojn de la kama-  
 radoj: Krjučkov, P. F. Melnikov.

## POŝTA FAKO

Pro manko da loko ni estas devigitaj aperigi poste arti-  
 kolojn de: Teply, Bruijn, Maréchal, Padfield, Diodono,  
 Tamo, E. Hakansson, Vincent Richard, Schwengeler.

Valeri. — Oni devas skribi nur sur unu flankon de  
 paperfolio.

K. Dek. — Ni petas, ke vi pli bone skribu: ni ne povas  
 diferenci la literojn p, t, n, h, f, g kaj j; ili ĉiuj estas same  
 faritaj.

V. Richard. — La artikoloj devas esti ricevitaj de ni  
 antaŭ la 10<sup>a</sup>.

### Bibliografio

Ni ricevis: *Le Congrès Esperantiste de Genève*, de  
 E. BOIRAC; broŝuro: 0 fr. 40.

Esperantista centra Oficejo: 51, rue de Clichy, Paris.

3<sup>an</sup> kajeron de la granda vortaro: *Français-Esperanto*.  
 1 fr. 50 afrankite. Monoferado: 17 fr. kontante aŭ 18 fr. pa-  
 geblaj 6 fr. ĉiutrimonate de la mendo. — Paris. Presa Es-  
 perantista Societo, 33, rue Lacépède.

## Naciaj Propagandaj Esperantistaj Revuoj

**Franclando.** — *L'Espérantiste*, monata, France kaj Esper. Jara  
 abono, kun enskribo en la S. f. p. E.: 4 fr. — L. de Beaufront,  
 Louviers (Eure), Franclando.

**Britlando.** — *The British Esperantist*, monata, Angle k. Esp.  
 Jara abono: 4 fr. — Brita Esperanta Asocio, 13, Arundel Str.,  
 London, W. C.

**Germanlando.** — *Germana Esperantisto*, monata, Germane k.  
 Esp. Jara abono: 4 fr. — Esperanto Verlag Möller und  
 Borel, 95, Prinzenstr., Berlin, s.

**Belglando.** — *La Belga Sonorilo*, duonmonata, France Flandre  
 k. Esp. Jara abono: 4 fr. — J. Coox, Duffel (Belglando).

**Ruslando.** — *Ruslanda Esperantisto*, monata, Ruse k. Esp.  
 Jara abono: 7 fr. 50. — Societo « Espero », 24, Bolš. Podja-  
 českaja, Peterburg (Rusl.)

**Pollando.** — *Pola Esperantisto*, dumonata, Pole k. Esp. Jara  
 abono: en Aŭstrio 1.80 k.; en eksterlando 2.50 fr. — Pola  
 Esperantisto, 26, Akademika, Lwow (Aŭstrol.).

**Bohemlando.** — *Časopis Českych Esperantistů*, monata,  
 Boheme k. Esp., Jara abono: 3.75 fr. — Karlovo namesti,  
 Praha-II. 313 (Boheml.).

**Svedlando.** — *Esperantisten*, monata, Svede k. Esp. Jara  
 abono: 3,50 fr. — P. Ahlberg, 37, Surbrungatan, Stockholm.

**Hungarlando.** — *Esperanto*, monata, Hungare k. Esp. Jara  
 abono: 4 fr. — Marich Agoston, Papnovelde-uteza 6, Buda-  
 pest (Hungarl.).

**Svislando.** — *Svisa Espero*, monata, nure Esperante. Jara  
 abono: 3 fr. — Th. Renard, 6, Vieux-Collège, Genève (Svisl.).

**Itallando.** — *Getratato Esperanta*, monata, Itale k. Esp. Jara  
 abono: 4 fr. — Rafaelo Bagnulo, Largo Gesu e Maria, 4,  
 Napoli (Itall.).

**Hispanlando.** — *La Suno Hispana*, monata, Hispane k. Esp.  
 Jara abono: 3 fr. — A. Jimenez Loira, Paz, 20, Valencia  
 (Hispanl.).

**Bulgarlando.** — Unua Paŝo, monata, nur Esperante. Jara abono: 3 fr. — S. Perkov, 26 str. San Sefano, Sofia (Bulgarl.).

**Peruo.** — Antaŭen Esperantistoj!! monata, Hispane k. Esp. Jara abono: 3 fr. — Dro Federico Villarreal, Apartado 927, Lima (Peruo).

**Unuigitaj Statoj Nord-Amerikaj.** — L'America Esperantisto, monata, Angle k. Esp., Jara abono: 5 fr. — L'America Esperantisto, Oklahoma City, U. S. A.

**Centra Ameriko.** — Centrameriko Esperantista, monata, Jara abono: 8-a av. Sur, 11. Canton Libertad (Guatemala).

**Hindlando.** — La Pioniro, monata, Angle k. Esp., Jara abono: 5 fr. — Klubo esperantista en K. G. F., Marikuppam, Mysore state, South India.

**Japanlando.** — Japana Esperantisto, monata, Angle Japane k. Esp., Jara abono: 2 fr. 60. — Japana Esperantisto, Jurakuŝa, Jurakuŝo, Tokio (Japani).

**Nova Zelando.** — New-Zeland Esperantist, monata, Angle k. Esp., Jara abono: 5 fr. — Christchurch Esperanto-Club, P. O. Box 149, Christchurch (N. Z.).

## Internaciaj kaj Specialaj Revuoj en Esperanto

**Lingvo Internacia.** — Monata, Jara abono: 5 fr., kiu literatura aldono: 7 fr. 50. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

**La Revuo.** — Literatura, monata, kun la konstanta kunlaborado de D<sup>r</sup> Zamenhof, Jara abono: 7 fr. — Hachette et C<sup>ie</sup>, 79, boulevard Saint-Germain, Paris.

**Tra la Mondo.** — Monata, multilustrata; Jara abono: 8 fr. — Tra la Mondo, 15, boulevard des Deux Gares, Meudon (S.-et-O.), Franclando.

**Idealo.** — Monata organo de « La Fasko »; Jara abono: 3 fr. — Vitangelo Nalli, Corso Calatafimi, 495, Palermo (Sicilio).

**Internacia Socia Revuo.** — Monata, ilustrata; Jara abono: 6 fr., kvaronjare: 1 fr. 75; unu numero: 0 fr. 60. — Internacia Socia Revuo, 45, rue de Saintonge, Paris.

**Internacia Scienca Revuo.** — Monata; Jara abono: 7 fr. — Internacia Scienca Oficejo, 8, rue Bovy-Lysberg, Genève.

**Foto-Revuo internacia.** — Monata, ilustrata; Jara abono: 5 fr. — Ch. Mendel, 118, rue d'Assas, Paris.

**Espero Faciŝta.** — Monata; Jara abono: 5 fr. — Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Seine) Franclando.

**Espero Katolika.** — Monata; Jara abono: 5 fr. — Presejo A. Barbot, 15, rue Etienne-Palu, Tours (Franclando).

**Esperanta Ligilo.** — Monata, en relief-punktoj Braille por blinduloj; Jara abono: 3 fr. — Tir. Cart, 12, rue Soufflot, Paris.

**Juna Esperantisto.** — Monata; Jara abono: 2 fr. 50. — Adm.: Presta Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

## DOKTORO DIODONO

Ĉefurba advokato de Sofio (Bulgarl.) aŭtoro de la lingvo Diodono « Diodonilo » kosto: 10 frankojn, donas konsilojn kaj defendas ĉiujn procesojn antaŭ ĉiuj lokaj kaj fremdaj uĝantaroj.

## ★ ESPERANTISTA LIBREJO DE "PACO-LIBERECO" ★

Paris-III<sup>e</sup> — 45, Rue de Saintonge (Franclando)

La librejo liveras ĉiujn Esperantajn verkojn (Libroj, broturoj, poŝtkartoj, plumoj, kraĵonoj, leterkovriloj, k. t. p.). Ĝi ricevas la abonojn por « Internacia Socia Revuo ».

La librejo konsentas rabaton da 10 o/o sur ĉiuj mendoj de la membroj de l'Asocio « Paco-Libereco ».

La tuta gajno de la librejo estas donacata al la Internacia Asocio « Paco-Libereco. »

## ★ KOLEKTO « PACO-LIBERECO » ★

Brosuroj :

1. Nova Gridlibreto por Soldato en cuij landoj, trad. Fi-Blan-Go kaj Ludoviko, kun letero de Ch. Malato kaj ilustraĵo de Grandjouan. . . . . Afr. Fr. 0 15
2. Al la Virinoj, laŭ U. Gohier — kaj Tre interesa letero de Hino pri la milito en Hindlando, trad. Fi-Blan-Go, kun antaŭparolo de Fimo F. Numietzka kaj ilustraĵo de Ludovic Rodo. . . . . Afr. Fr. 0 15

Postkartoj :

1. Unu mamu por ĉiu, Unu koro por ĉiuj! (koverto de Socia Revuo) de A. Willette 12 ekz. Afr. Fr. 1 »  
50 — — 3 50  
100 — — 6 »

Mendeblij ĉe la « Internacia Asocio « Paco-Libereco », 45, Rue de Saintonge — Paris-III<sup>e</sup> (Franclando), aŭ ĉe ĉiuj Esperantistaj librejoj.

## LINGVO INTERNACIA

Centra Organo de la Esperantistoj

ELIRANTA LA 15-AN DE ĈIU MONATO

La plej malvona el ĉiuj Esperantistoj gazetoj, fondita en 1895

ADMINISTRACIO :

Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

JARA ABONO :

Sen Literatura Aldono . . . . . 5 fr. »  
Kun Aldono . . . . . 7 fr. 50

Specimena numero estas senpage ricevebla

## DESEGNAĴOJ

Ni eldonis unu centon de la jenaj desegnaĵoj sur belega papero, formato 28×38 cmj.

Ili estas aĉeteblaj (kaj aĉetindaj!) de niaj amikoj po 75 centimoj afrankite, je la profito de *Internacia Socia Revuo* :

1. Unu mamu por ĉiu! Unu koro por ĉiuj! de A. Willette.
2. Interkompreniĝo forigas malpacon! de Hermann-Paul.
3. Militarismo! de L. Rodo.

La Presisto: Presa komunisto Societo



L'Emancipatrice  
3, r. de Pondichéry, Paris  
F. TIZORIN, adm.-délég.